

**THE STANDARD SERIES**

---

---

# A FIRST READER

IN

# ESPERANTO

*Compiled by*

**E. A. LAWRENCE**

A  
0  
0  
0  
1  
2  
6  
4  
3  
9  
9



**ANNEX**

California  
gional  
cility

Chicago

Toronto

---

---

**FLEMING H. REVELL COMPANY**

London and Edinburgh

---

---

**PRICE TWENTY-FIVE CENTS NET**



17. 1. 74  
23

Digitized by the Internet Archive  
in 2007 with funding from  
Microsoft Corporation

# A FIRST READER

INTENDED FOR THOSE WHO ARE  
BEGINNING THE STUDY  
OF ESPERANTO

COMPILED BY  
E. A. LAWRENCE



NEW YORK

CHICAGO

TORONTO

FLEMING H. REVELL COMPANY

LONDON AND EDINBURGH

## GUIDE TO CONTENTS

---

THIS little book has a two-fold object—it is intended for a Reader and Reciter, and also to help those beginners who find some difficulty in using the correlatives and affixes correctly.

The story taken [for illustration is one out of the collection known as *Esperantaj Prozaĵoj*, and has been chosen on account of the suffixes and prefixes used in the story, some 24 occurring in its course.

It must not be forgotten that these suffixes and prefixes may themselves be used as independent words, as well as in helping to form compound words.

Dr. Zamenhof says in his *Fundamenta Krestomatio*:—

“I arranged a complete *dismemberment* of ideas into independent words, so that the whole language, instead of words in different grammatical forms, consists only of unchangeable words. If you take any work written in my language, you will find that every word appears always and only in one unalterable form, namely, that in which it is printed in the Dictionary. The various grammatical inflections are expressed by the junction of unchangeable syllables.”

Thus prefixes and suffixes such as *-aj-*, *-ec-*, *-em-*,

-re-, -id-, etc., may all be used as independent words, the addition of 'o' forming a noun, thus *aĵo*, 'a thing,' *eco*, 'a quality'; the addition of 'i' forming the infinitive of a verb, as *iĝi*, 'to become,' etc. It sometimes happens that a word, apparently consisting of a root and an affix, is itself a root. For example, in the word *tornistro*, "a knapsack," *ist* is not a suffix denoting occupation, but a part of the root *tornistr*.

Another thing for the beginner to remember is that in Esperanto words often cannot be translated literally; that which is needed is an exact translation of the underlying idea which different nations often render in varying ways. For instance, the Frenchman says, "I have hunger"; the English and Germans, "I am hungry." The Englishman says, "How do you do?"; the German, "How do you find yourself?"; the Frenchman, "How do you carry yourself?"; yet all mean the same thing, *Kiel vi fartas?*

Finally, I hope no one will suppose that in these two stories I have included every possible difficulty. If necessary, this little Reader will be No. 1 of a series.

I take here the opportunity of thanking M. de Beaufront, the Messrs. Hachette, R. Van Melckebeke, Capt. Capé, and others for permission to reprint; and also the kind friends who have advised and helped me in the preparation of this FIRST READER. E. A. LAWRENCE.

## GUIDE TO CONTENTS

---

THIS little book has a two-fold object—it is intended for a Reader and Reciter, and also to help those beginners who find some difficulty in using the correlatives and affixes correctly.

The story taken for illustration is one out of the collection known as *Esperantaj Prozaĵoj*, and has been chosen on account of the suffixes and prefixes used in the story, some 24 occurring in its course.

It must not be forgotten that these suffixes and prefixes may themselves be used as independent words, as well as in helping to form compound words.

Dr. Zamenhof says in his *Fundamenta Krestomatio*:—

“I arranged a complete *dismemberment* of ideas into independent words, so that the whole language, instead of words in different grammatical forms, consists only of unchangeable words. If you take any work written in my language, you will find that every word appears always and only in one unalterable form, namely, that in which it is printed in the Dictionary. The various grammatical inflections are expressed by the junction of unchangeable syllables.”

Thus prefixes and suffixes such as *-aj-*, *-ec-*, *-em-*,



*-re-*, *-id-*, etc., may all be used as independent words, the addition of 'o' forming a noun, thus *ajo*, 'a thing,' *eco*, 'a quality'; the addition of 'i' forming the infinitive of a verb, as *igi*, 'to become,' etc. It sometimes happens that a word, apparently consisting of a root and an affix, is itself a root. For example, in the word *tornistro*, "a knapsack," *ist* is not a suffix denoting occupation, but a part of the root *tornistr*.

Another thing for the beginner to remember is that in Esperanto words often cannot be translated literally; that which is needed is an exact translation of the underlying idea which different nations often render in varying ways. For instance, the Frenchman says, "I have hunger"; the English and Germans, "I am hungry." The Englishman says, "How do you do?"; the German, "How do you find yourself?"; the Frenchman, "How do you carry yourself?"; yet all mean the same thing, *Kiel vi fartas?*

Finally, I hope no one will suppose that in these two stories I have included every possible difficulty. If necessary, this little Reader will be No. 1 of a series.

I take here the opportunity of thanking M. de Beaufront, the Messrs. Hachette, R. Van Melckebeke, Capt. Capé, and others for permission to reprint; and also the kind friends who have advised and helped me in the preparation of this FIRST READER. E. A. LAWRENCE.

## ALPA ROZO.

La montoj estas kaj restas ĉarmego por ĉiuj amikoj de bela naturo.

Tiel ankaŭ profesoro Petro Brummer opiniis, kaj tial li ĉiujare vojaĝadis Svisujon kun sia edzino: infanojn ili ne havis.

Profesoro Brummer estis kun tuta sia instruiteco granda infano, havanta grandan respekton por ĉiuj homoj, antaŭ ĉio por sia edzino, kiu tamen, tion mi devos konfesi por ŝia laŭdo, neniel trouzis lian obeemon.

Tiun ĉi jaron ili estis trovintaj bonegan lokon, bongustan nutraĵon, puretan loĝejon, agrablan kunvivantaron, kaj sufiĉe konvenan prezon.

Tien ankaŭ nia ministro estis vojaĝonta en tiu tempo.

La loko posedis krom tio la netakseblan preferindecon, ke la profesoro povis entrepreni siajn

*Tiel*, thus, so.

*Tial*, therefore.

*Ĉiu*, each (*ĉiujare*, yearly).

*Ĉiuj homoj*. Here *ĉiu* takes the plural sign in agreement with *homoj*.

*Ĉio*, everything. This word from its nature cannot have a plural, but it may take the accusative "n."

*Kiu*, who.

*Tion*, that. This word is the object of the verb "confess," and therefore takes the accusative "n."

*Tien*, there. As the sense indicates movement, *tie* requires the "n" of direction.

*Tiu*, that, specified person or thing (used in conjunction with noun).

*Tio*, that (thing).

*Tro-uzi*, compound word, from *tro*, too much, and *uzi*, to use.

## AN ALPINE ROSE.

Word.	Affixes.
<i>Ĉarm-eg-o</i> , a delight, from <i>Ĉarma</i> , charming.	<i>eg</i> denotes <i>increase of degree</i> , as <i>bonega</i> , excellent.
<i>Vojaĝ-ad-is</i> , travelled, from <i>vojaĝi</i> , to make a journey.	<i>ad</i> denotes <i>an action which is continued or habitual</i> , as <i>parolado</i> , a speech.
<i>Svis-uj-on</i> , Switzerland.	<i>uj</i> denotes <i>that which contains</i> .
<i>Edz-in-o</i> , wife, from <i>edzo</i> , husband.	<i>in</i> denotes <i>the feminine sex</i> .
<i>Instru-it-ec-o</i> , having-been-instructedness (knowledge), from <i>instrui</i> , to instruct.	<i>ec</i> denotes <i>abstract quality</i> , corresponds with the English suffixes "ness," "ship," "ity," etc., as <i>amikeco</i> , friendship.
<i>Obe-em-on</i> , obedience, from <i>obei</i> , to obey.	<i>em</i> denotes <i>inclination, or propensity to</i> , as <i>laborema</i> , laborious.
Tractability, would be the better translation, as <i>obeeco</i> is obedience.	
<i>Nutr-aĵ-on</i> , food, from <i>nutri</i> , to feed.	<i>aĵ</i> denotes <i>that which something is made from or has the quality of</i> : (it is concrete, and not abstract like <i>ec</i> ), and may often be distinguished by inserting the word "thing" thus, <i>infanaĵo</i> , a childish thing.
<i>Pur-et-an</i> , fairly clean, from <i>pura</i> , pure.	<i>et</i> denotes <i>diminution of degree</i> , as <i>monteto</i> , a hill.
<i>Loĝ-ej-on</i> , lodging, from <i>loĝi</i> , to lodge.	<i>ej</i> denotes <i>a place specially used for</i> , as <i>preĝejo</i> , a church.
<i>Kun-viv-ant-ar-on</i> , from <i>kun</i> , with, and <i>vivi</i> , to live.	<i>ar</i> denotes <i>a collection</i> ; the word here means "society."
<i>Ne-taks-eblan</i> , inestimable, <i>ne</i> , not <i>taksi</i> , to appraise, estimate.	<i>ebl</i> denotes <i>possibility</i> , as <i>fleksebla</i> , flexible.
<i>Prefer-ind-ec-on</i> , advantage (the quality of being worthy of preference).	<i>ind</i> denotes <i>worthy of, deserving</i> . <i>ec</i> denotes <i>abstract quality</i> .

devajn montovagadojn sen tro granda fortuzo, kio, por viro kun korpo kiel tiu de l' profesoro, estis ŝatindega.

En la tago, kiam tiu ĉi vera okazintaĵo fariĝis, la profesoro celis la supron de la 50-metrojn-alta Ochsenkegel, kaj al tio ĉi li estis dediĉinta 7 horojn.

“Alportu kun vi Alpan rozon al mi, Peĉjo!” diris la profesoredzino al sia foriranta edzo, kiu, obeema kiel ĉiam, penis plenumi ŝian deziron.

La suprenirejo estis belega. Veninte kelkajn metrojn alten kaj jam ne videbla por sia edzino, li prenis iom da tritikaĵo kaj botelon da bona vino el sia tornistro kaj sidiĝis (see page 9) sur ŝtonon por ĝui la belecon (see page 9) de l' naturo.

*Kio*, which, what (thing).

*Kiel*, like, how, as.

*Tiu*, that; specified person or thing (used in conjunction with noun).

*Kiam*, when.

*Tiu ĉi*, this (used in conjunction with noun).

*Tio ĉi*, this (thing understood); it is the ascent which is referred to.

*Kiu*, who.

*Profesor-edzino*, a compound word, meaning the professor's wife.

*Fort-uzo*, compound word, meaning exertion.

Word.	Affixes.
<i>Monto-vag-ad-ojn</i> , mountaineering, <i>monto</i> , hill, and <i>vagi</i> , to ramble.	<i>ad</i> denotes an action which is continued, the Professor was going to ramble about the mountains.
<i>Sat-ind-eg-a</i> , very much to be appreciated, from <i>sati</i> , to like, to appreciate.	<i>ind</i> denotes worthy of. <i>eg</i> denotes increase of degree, thus <i>amindega</i> , very lovable.
<i>Okazint-aj-o</i> , occurrence, event, from <i>okazi</i> , to happen.	<i>aj</i> denotes that which is made from, or has the quality of.
<i>Far-ig-is</i> (literally, became made), from <i>fari</i> , to make. (The nearest English equivalent, in this case, is "took place").	<i>ig</i> denotes to become (to get, to turn), as <i>rugigi</i> , to blush, <i>paligi</i> , to turn pale.
<i>Pe-ĉj-o</i> , dear Pete. <i>Petro</i> was the professor's name.	<i>ĉj</i> These letters substituted for two or more letters of a man's name make of it an affectionate diminutive.
<i>Obe-em-a</i> , obedient, from <i>obei</i> , to obey.	<i>em</i> denotes inclination to.
<i>Plen-um-i</i> , to fulfil, from <i>plena</i> , full, complete.	<i>um</i> like <i>je</i> has no specially defined meaning; it is therefore necessary to learn the words in which it occurs, as if they were roots.
<i>Supren-ir-ej-o</i> , ascent (upward route), from <i>supre</i> , above, and <i>iri</i> , to go.	<i>ej</i> denotes a place specially devoted to; <i>ejo</i> , as a noun, means a place, a locale. All these suffixes can be used separately, if necessary or convenient.
<i>Bel-eg-a</i> , splendid, from <i>bela</i> , fine, beautiful,	<i>eg</i> denotes increase of degree.
<i>Vid-eb-l-a</i> , visible, from <i>vidi</i> , to see.	<i>eb-l</i> denotes possibility, as <i>kompren-eb-la</i> , understandable (possible to be understood).
<i>Tritik-aj-o</i> , wheaten bread, from <i>tritik'</i> , wheat.	<i>aj</i> denotes that from which something is made.

Li ĵus estis ekintencinta kun bonega apetito konsumi la tritikaĵon, kiam subite apud li staris ciganino kun infaneto sur la brako.

“Mizera ciganino malsatas ; donacu al ŝi iom da nutraĵo !”

Brummer estis bona viro kun bonega koro : tial ne ŝanceliĝante eĉ momenton, li donis al ŝi la tritikaĵon kaj la botelon.

Ŝi sidiĝis antaŭ li kaj efektive englutis la panon, dum ŝi longe kaj penseme rigardis lin per siaj grandaj, nigraj okuloj.

“Afabla sinjoro, mi humile dankas !” diris ŝi, fininte la manĝadon. “Tio estis tre bongusta, sed . . . la infano ankaŭ malsatas ; mi intencas petegi iom da lakto ĉe ia vilaĝanino ; vi, sinjoro, volu teni la knabon ; li dormas ; mi tuj revenos ?”

Antaŭ ol la instruitulo havis la tempon malfermi la buŝon por protesti, ŝi metis la infaneton sur liajn brakojn, rigardis ankoraŭ unu fojon explore la profesoron, kaj rapidis for de tie tra la arbetaĵoj (see page 11).

*Iom*, a little, some.

*Tial*, therefore, for that reason.

*Ia*, some.

*Tio*, that (thing).

*Tie*, there, in that place.

*Bon-gusta*, nice, compound word, from *bona*, good, and *gusto*, taste.

Word.	Affixes.
<i>Sid-ig-is</i> , became seated, sat down ( <i>i.e.</i> , he was standing up, and then sat down), from <i>sidi</i> , to sit.	<i>ig</i> denotes <i>to become, etc.</i> ; <i>li sidis</i> would mean "he sat, or was seated."
<i>Bel-ec-on</i> , beauty, from <i>bela</i> , beautiful, fine.	<i>ec</i> denotes <i>abstract quality</i> ; a "beautiful thing" would be <i>belajo</i> .
<i>Ek-intencinta</i> , he had just settled himself (literally, had begun to intend), from <i>intenci</i> , to intend.	<i>ek</i> marks <i>the beginning of an action</i> , as <i>ekkrii</i> , to cry out, <i>ekkanti</i> , to begin to sing.
<i>Cigan-in-o</i> , gipsy woman, from <i>cigano</i> , gipsy.	<i>in</i> denotes <i>the feminine</i> .
<i>Infan-et-o</i> , a baby, from <i>infano</i> , a child.	<i>et</i> denotes <i>the diminutive</i> .
<i>Mal-satas</i> , is hungry, from <i>sati</i> , to be satiated.	<i>mal</i> denotes the direct opposite of any idea, as <i>forta</i> , strong, <i>malforta</i> , weak.
<i>Ŝancel-ig-ante</i> , hesitating, wavering, from <i>ŝanceli</i> , to shake (cause to waver).	<i>ig</i> denotes <i>becoming</i> ; the literal translation is, therefore, becoming to waver.
<i>Pens-em-e</i> , thoughtfully, from <i>pensi</i> , to think.	<i>em</i> denotes <i>inclination to or disposition to</i> .
<i>Manĝ-ad-on</i> , meal, from <i>manĝi</i> , to eat.	<i>ad</i> denotes <i>continuance of action</i> , and a meal usually represents more than one eatable ( <i>manĝajo</i> ).
<i>Pet-eg-i</i> , beseech, from <i>peti</i> , to ask, beg.	<i>eg</i> denotes <i>increase of degree</i> .
<i>Vilaĝ-an-in-o</i> , a woman villager.	<i>an</i> denotes <i>an inhabitant</i> . <i>in</i> denotes <i>the feminine</i> .
<i>Instruit-ul-o</i> , learned man, from <i>instruita</i> , instructed.	<i>ul</i> denotes <i>person characterised by</i> , as <i>juna</i> , young, <i>junulo</i> , a youth.
<i>Mal-fermi</i> , to open, from <i>fermi</i> , to shut.	<i>mal</i> denotes <i>the direct opposite of any idea</i> .

“Ho! se Aŭgusta povus vidi min en tiu ĉi situacio!” murmuris la profesoro, rigardante la dormantan infanon kun plej granda intereso. La bruna vizaĝeto ridetis en sonĝo kaj la profesoro tiel ĉarmiĝis, ke li ne povis ne kisi la malgrandulon.

Tiam tiu ĉi vekigis, kaj antaŭ la neordinara vidaĵo de l' grizbarba vizaĝo li komencis kriegi per la tuta forto de siaj junaj ciganaj pulmoj.

Nun la situacio fariĝis malpli agrabla.

Brummer ekĝemante ĉirkaŭrigardis, serĉante la patrinon, sed ŝi nenie estis videbla. Tiam li senhelpe turnis sin al la krieganta infano. Li ne povis imagi al si demandon pli malfacile respondoblan ol tiun ĉi: kiamaniere do kvietigi kriegantan ciganidon? Se li estus kapabla kanti ian lulkanteton, estus bonege, sed bedaŭrinde li tion ne povis. Li grimacis, ridegis, sulkigis la brovojn, kantis “Gaudeamus” \* kaj “Die Wacht am Rhein,” sed lia provizo da kantoj ne sufiĉis—Ĉio vane! Li

*Tiu ĉi*, this (*situacio* follows); in line 6 it may be translated “the latter.”

*Tiel*, so (in such a manner).

*Tiam*, then.

*Ĉio*, everything, all.

*Tiun ĉi* (refers to *demandon*, and therefore takes the accusative “*n*” also).

*Ian*, any kind of (takes accusative “*n*” in agreement with *lulkanteton*).

*Tion*, that (object of *li ne povis*, and therefore takes the accusative “*n*”).

*Kia-maniere*, compound word, meaning “in what manner.”

*Sen-helpe*, compound word, meaning “helplessly.”

\* A translation by Dr. Zamenhof of “Gaudeamus,” a famous German student song, will be found on page 36.



Word.	Affixes.
<i>Arb-et-aĵ-oj</i> , bushes (literally, little tree things).	<i>et</i> denotes <i>diminution of degree</i> . <i>aĵ</i> denotes <i>something which has the quality of, a concrete thing, not an abstract idea</i> .
<i>Vizaĝ-et-o</i> , little face.	<i>et</i> denotes <i>diminution of degree</i> .
<i>Rid-et-is</i> , smiled, from <i>ridi</i> , to laugh.	<i>et</i> denotes <i>diminution of degree</i> .
<i>Ĉarm-ig-is</i> , charmed, from <i>ĉarmi</i> , to charm.	<i>ig</i> denotes <i>to become</i> .
<i>Mal-grand-ul-on</i> , little one.	<i>mal</i> denotes <i>the opposite of</i> . <i>ul</i> denotes <i>person characterised by</i> .
<i>Vek-ig-is</i> , woke up, from <i>veki</i> , to awake (intrans.).	<i>ig</i> denotes <i>becoming</i>
<i>Vid-aĵ-o</i> , sight, from <i>vidi</i> , to see.	<i>aĵ</i> denotes <i>something which has the quality of</i> .
<i>Kri-eg-i</i> , to howl or shout, from <i>krii</i> , to cry.	<i>eg</i> denotes <i>increase of degree</i> .
<i>Mal-pli</i> , less, from <i>pli</i> , more.	<i>mal</i> denotes <i>the contrary</i> .
<i>Ek-ĝemante</i> , sighing- ly, from <i>ĝemi</i> , to groan.	<i>ek</i> marks <i>the beginning of an action</i> ; a sigh is not usually so pro- longed as a groan.
<i>Mal-facila</i> , difficult, <i>facila</i> , easy.	<i>mal</i> denotes <i>the contrary</i> . <i>Pli malfacila respondeblan</i> is equivalent to "more difficult to answer."
<i>Respond-obl-a</i> , answer- able, from <i>respondi</i> , to answer.	<i>obl</i>
<i>Kviet-ig-i</i> , to quiet (make quiet).	<i>ig</i> denotes <i>causing to be</i> , and it, therefore, makes the verb transitive, its object taking the accusative "n."
<i>Cigan-id-on</i> , gipsy child, from <i>cigano</i> , a gipsy.	<i>id</i> denotes <i>offspring</i> .
<i>Lul-kant-et-on</i> , a lulla- by, from <i>luli</i> , to lull, and <i>kanto</i> , a song.	<i>et</i> shows <i>diminution in degree</i> ; the word is literally a little lulling song.
<i>Bedaŭr-ind-e</i> , from <i>bedaŭri</i> , to regret.	<i>ind</i> denotes <i>worthiness</i> ; the equiva- lent English expression is "unfortunately."

elŝiris herban trunketon kaj tiklis per ĝi la malgrandulon, sed tio neniel efikis. Li kriegis kaj ĵuris, sed eĉ tio ne impresis la plorkrianton plej malmulte. Tiu ĉi daŭrigadis senĉese kaj lia vizaĝo fine fariĝis tiel punca, ke Brummer serioze ektimis por lia sano, jam antaŭvidante proceson pro malzorgo pri komisiita infano.

Fine li sukcesis per sia poŝhorloĝo altiri la atenton de l'brava junuleto. La knabo ekkaptis ĝin per siaj ambaŭ manoj kaj ekdormis kun vanaj penadoj por ĝin meti en la buŝon kaj manĝi ĝin.

Kion li do nun povis fari ?

Atendi ankoraŭ pli longe estis apenaŭ konsilinde. La suno jam bruligis lin varmege, dum ĉirkaŭ li—kion Brummer kun granda ĉagreno rimarkis—amase kolektiĝis grandaj avidaj formikoj, kiuj, kiel oni scias, estas specialistoj por homaj kruroj.

Se li forirus, li riskus, ke la patrino ne trovus lin, kaj tiel, li eble estus suspektata pri forrabo de infano.

Tial li, malgraŭ ĉio, restis ankoraŭ paron da horoj en la sunbruligado (see page 15) ĝis lia zorgato, kiun li ŝirmis kontraŭ la radioj per sia pajla ĉapelo, revekiĝis (see page 15) kaj denove komencis sian pulmogimnastikon.

#### COMPOUND WORDS.

*Plor-krianto*, weeper, from *plori*, to weep, *krii*, to cry ; the participle *ant*, and the noun ending "o."

*Sen-ĉese*, without ceasing, ceaselessly.

*Antaŭ-vidante*, foreseeing.

*Poŝ-horloĝo*, watch (pocket-clock).

*For-rabo*, abduction.

*Pulmo-gimnastikon*, lung-exercise.

Word.	Affixes.
<i>Rid-eg - is</i> , laughed loudly.	<i>eg</i> denotes <i>increase of degree</i> .
<i>Sulk-ig-is</i> , wrinkled, from <i>sulko</i> , a wrinkle.	<i>ig</i> denotes <i>causing to be</i> .
<i>Trunk-et-o</i> , stem, stalk, from <i>trunko</i> , trunk.	<i>et</i> denotes <i>diminution of degree</i> .
<i>Plej-mal-multe</i> , in the least, from <i>multe</i> , more.	<i>mal</i> The opposite of.
<i>Daŭr-ig-ad-is</i> , continued (his crying), from <i>daŭri</i> , to last, to go on (intransitive).	<i>ig</i> denotes <i>to cause to be</i> . <i>ad</i> denotes <i>duration of the action</i> . <i>La plorado daŭris</i> , the weeping lasted, <i>ŝi daŭrigadis la ploradon</i> , she continued the weeping.
<i>Ek-timis</i> , began to be afraid, from <i>timi</i> , to fear.	<i>ek</i> marks <i>the beginning of an action</i> .
<i>Mal-zorgo</i> , negligence, from <i>zorgi</i> , to care for.	<i>mal</i> denotes <i>the opposite</i> .
<i>Jun-ul-et-o</i> , youngster (little young one).	<i>ul</i> denotes <i>person characterised by</i> . <i>et</i> denotes <i>diminution of degree</i> .
<i>Ek-kaptis</i> , seized, from <i>kapti</i> , to capture.	<i>ek</i> marks <i>the beginning of an action</i> , as <i>ekdormi</i> , to doze.
<i>Pen - ad - oj</i> , efforts, from <i>peni</i> , to endeavour, to strive.	<i>ad</i> denotes <i>duration of the action</i> .
<i>Konsil-ind-e</i> , advisable, from <i>konsili</i> , to advise.	<i>ind</i> <i>worthy of</i> ; <i>ind</i> and <i>abl</i> are both often rendered -able, or -ible in English; but in Esperanto the one means <i>worthy of</i> , the other <i>possible to</i> .
<i>Brul-ig-is</i> , burnt, from <i>bruli</i> , to be-on-fire, to burn.	<i>ig</i> <i>Bruligi</i> is <i>to burn (something)</i> ; to set on fire, to light (a fire) is <i>ekbruligi</i> (trans.).
<i>Kolekt-iĝ-is</i> (became), gathered, from <i>kolekti</i> , to gather.	<i>iĝ</i> denotes <i>to become</i> .
<i>Special-ist-oj</i> , specialists, from <i>speciala</i> , special.	<i>ist</i> denotes <i>one following some occupation</i> .

Li nun tute malŝatis eĉ la oran poŝhorloĝon kaj kriegis tiel forte, ke li simple povus malesperigi ŝtonon.

Nun la bonkora profesoro fariĝis malkontenta. Ĉu la ciganino ne havis lakton? ĉu ŝi tute forgesis sian infanon? En tiu ĉi lasta okazo li eble havas la dolĉan perspektivon konservi ĉe si la krieman ciganidon!

Li pene kolektis uzaĵojn, apartenaĵojn, forgesis kompreneble la infanon, kaj, timege rapidis reen por preni ĝin, sed kiam li kliniĝis, ĉiuj liaj ŝlosiloj falis el la poŝoj. . . . Fine li sukcesis kolekti ĉion kaj li foriris.

Sufiĉe rimarkinde! Ĉiuj liaj demandoj en la vilaĝaj dometoj restis sen rezultato. Neniu estis vidinta la ciganinon.

“Ŝi do certe forlasis al vi la idon!” opiniis la lasta vilaĝano, kiun li demandis.

—“Forlasis!” murmuris la profesoro, lacigita, falante sur benkon. “Kion vi volas diri?”

—“Si certe rimarkis, ke vi estas bonkora viro kaj ke la infano ĉe vi havos pli agrablan vivon ol ĉe ŝi. Tial ŝi forlasis al vi la idon kaj malaperis.”— (see page 17).

“Aŭgusta!” ĝemis la profesoro malgaje. “Kion do Aŭgusta diros? Ŝi kompreneble povos imagi al si kion ajn! Ne . . . Ne, tia (such an) abomena patrino ne povas esti!”

—“Ĉu do ŝi ne estas ciganino?” demandis, levante la ŝultrojn, la vilaĝanino, ĵus reveninte kun pokalo da varma lakto. “Donu lakton al li. Li malsatas.”

Word.	Affixes.
<i>Sun-brul-ig-ad-o</i> ( <i>en la</i> ), exposed to the heat of the sun, from <i>bruli</i> , to be burning.	<i>ig</i> denotes <i>causing to be</i> . <i>ad</i> denotes <i>continuation</i> .
<i>Re-vek-iĝ-is</i> , awoke again, from <i>veki</i> , to awaken (intrans.).	<i>re</i> means <i>again, anew</i> . <i>iĝ</i> denotes <i>to become</i> .
<i>Mal-ŝatis</i> , despised, from <i>ŝati</i> , to appreciate.	<i>mal</i> denotes <i>the contrary</i> ( <i>ŝati</i> and <i>sati</i> are different words and must not be confused).
<i>Mal-esper-ig-i</i> , to cause to despair, from <i>esper</i> , to hope.	<i>mal</i> denotes <i>the contrary</i> . <i>ig</i> denotes <i>to cause to be</i> .
<i>Mal-kontenta</i> , annoyed, from <i>kontenta</i> , content.	<i>mal</i> denotes <i>the contrary</i> , as <i>malgaje</i> , <i>dismally</i> .
<i>Kri-em-an</i> , crying, from <i>kri</i> , to cry.	<i>em</i> marks <i>inclination to</i> .
<i>Uz-aĵ-ojn</i> , utensils, from <i>uzi</i> , to use.	<i>aĵ</i> } denotes <i>something having the quality of</i> .
<i>Aparten-aĵ-ojn</i> , belongings, from <i>aparteni</i> , to belong.	
<i>Tim-eg-e</i> , affrightedly, from <i>timi</i> , to fear.	<i>eg</i> denotes <i>increase of degree</i> .
<i>Re-en</i> , back (again).	<i>re</i> is here an independent word taking the adverbial form <i>ree</i> , and the accusative "n" as shewing motion.
<i>Klin-iĝ-is</i> , bent (became bent), from <i>klini</i> , to bend.	<i>iĝ</i> denotes <i>to become</i> .
<i>Ŝlos-il-oj</i> , keys, from <i>ŝlosi</i> , to lock.	<i>il</i> marks <i>the instrument</i> .
<i>Rimark-ind-e</i> , remarkable.	<i>ind</i> denotes <i>worthy of</i> , as <i>rigardinde</i> , <i>worth looking at</i> .
<i>Dom-et-oj</i> , cottages, from <i>domo</i> , a house.	<i>et</i> shews <i>diminution of degree</i> .
<i>Vilaĝ-an-o</i> , villager.	<i>an</i> denotes <i>an inhabitant of</i> .
<i>Lac-ig-ita</i> , tired (made tired), from <i>laca</i> , weary.	<i>ig</i> denotes <i>causing to be</i> .
<i>Id-on</i> , child.	<i>id</i> example of a suffix used independently.

Estis do vidaĵo rigardinda : la profesoro per kulero enigante la lakton en la kontente ridetantan kreitaĵon, murmurante de tempo al tempo : “Kion do Aŭgusta diros ?”

Ĝuste en tiu ĉi momento la ministro, armita por ĉasado, alproksimiĝis sur la deklivo. Li sufiĉe longan tempon, videble tuŝata, konsideris la grupon : fine la profesoro okaze ekrigardis kaj pro timego faligis ĉion.

“Ha ! mia kara Brummer, ĝojigis min treege, ke vi ricevis pliĝon familian. Mi gratulas !”

“Sed mi . . . mi . . . Via Ekscelenca Mōsto . . .” balbutis la profesoro al la foriranta ministro. . . . Poste, kun miksaĵo de furiozeco kaj malespero, li levis la kreitaĵon sur la brakon, por, kolektinte tutan sian kuraĝon, porti ĝin al sia Aŭgusta.

Li renkontis ŝin en la ĝardeno inter amaso da virinoj vizitantaj. Kompreneble li paŝis al ŝi kun la infano sur la brako kaj, dum la vizitantinoj ridetis kaj babiladis, la edzino surprizita demandis :

“Sed, Peĉjo ! Kion vi alportas kun vi ?”

“Tio estas,” balbutis la malfeliĉulo, “estas la promesita Alpa Rozo !”

Poste li estis devigita raporti, kiel ĉio okazis.

“Bone !” diris la profesoredzino dolĉe. “Tio estas Alpa Rozo alia, ol mi imagis, sed ni povas konservi ĉe ni ankaŭ tiun ĉi.”

Li premis kortuŝite ŝian manon.

Rakontante por la 150<sup>a</sup> fojo la historion al siaj amikoj, li solene ĵuris, ke li neniam permesos al kiu ajn lasi al li infanon, ne eĉ por unu sekundo !

MAGNUS NORDENSVAN.

*El “Esperantaj Prozaĵoj.”*

Word.	Affixes.
<i>Mal - aperis</i> , disappeared, from <i>aperi</i> , to appear.	<i>mal</i> denotes <i>the direct opposite</i> , as <i>malespero</i> , despair.
<i>En-ig-ante</i> , feeding (literally, causing to enter).	<i>ig</i> denotes <i>making</i> , or <i>causing</i> .
<i>Kreit-aĵ-on</i> , creature (created thing), from <i>krei</i> , to create.	<i>aĵ</i> denotes <i>that which has the quality of</i> .
<i>Ĉas-ad-o</i> , hunting, from <i>ĉasi</i> , to hunt.	<i>ad</i> denotes <i>an action which is continued</i> ; <i>armita por ĉasado</i> means equipped for the chase.
<i>Alproksim-iĝ-is</i> , approached, from <i>proksime</i> , near.	<i>iĝ</i> denotes <i>to become</i> .
<i>Ek-rigardis</i> , glanced up, from <i>rigardi</i> , to look at.	<i>ek</i> marks <i>the beginning of an action</i> .
<i>Ĝoj-ig-as</i> , delighted (it delights me; I am delighted), from <i>ĝojo</i> , joy (literally, made joyful).	<i>ig</i> denotes <i>causing to be</i> .
<i>Tre-eg-e</i> , extremely.	<i>eg</i> denotes <i>increase of degree</i> .
<i>Pli - iĝ - on</i> , addition, from <i>pli</i> , more.	<i>iĝ</i> denotes <i>to become</i> .
<i>Ekscelenca Moŝto</i> , Your Excellency.	<i>Moŝto</i> used by itself, or added to a title to shew respect.
<i>Miks-aĵ-o</i> , mixture, from <i>miksi</i> , to mix.	<i>aĵ</i> denotes <i>that which has the quality of</i> (see page 5, "aĵ").
<i>Furioz-ec-o</i> , fury (furiousness), from <i>furi-oz-a</i> , furious.	<i>ec</i> denotes <i>abstract quality</i> (see page 5, "ec").
<i>Vir - in - oj</i> , women, from <i>viro</i> , man.	<i>in</i> denotes <i>the feminine</i> , as <i>vizitantinoj</i> , lady visitors.
<i>Babil-ad-is</i> , chattered, from <i>babili</i> , to chatter.	<i>ad</i> denotes <i>an action which is continued</i> .
<i>Mal-feliĉ-ul-o</i> , the unhappy or unfortunate man, from <i>feliĉa</i> , happy, fortunate.	<i>mal</i> denotes <i>the direct opposite</i> . <i>ul</i> denotes <i>person characterised by</i> .

## KIO OKAZIS AL HENĈJO.

Henĉjo Longfellow ne estis feliĉega unu mardon, ĉar li ĵus forlasis sian hejmon kaj alvenis al la lernejo la unuan fojon.

Li trovis tre longa la tagon, tra kies tuta daŭro, li sin sentis tre nerva kaj mallerta. Kiam la lernejestro diris al li: "Skribu vian nomon tie ĉi," li metis sian plumingon sen plumo en seninkan inkujon, lasis fali sian krajonujon, rompis siajn krajonojn, kaj kiam oni demandas lin "En kio konsistas la riĉeco de Irlando," li respondis, "En la multeco da cigarujoj kaj cigaringoj faritaj tie." Nu li estis en la dormejo kune kun dudek fremdaj knaboj. Lia nervemo kaj sento de fremdeco estis ankoraŭ pli granda por tio, ke li estas la sola infano de siaj gepatroj. "Shorty," diras knabeto, kiu ĵus stariĝis sur lito kaj ekstarigis alian knabon tie apud li. Ĉiuj kapoj turniĝis al Henĉjo, kiu malfacile komprenis, ke oni nomas lin "Shorty." La knabeto daŭrigis laute "Kiam nova knabo alvenas al nia dormejo, ni ĉiuj montradas la enhavon de niaj poŝoj, kaj mi ĉiam disdividas ĝin de nove. Ho! nun vi ĉiuj ekmalplenigu kune viajn poŝojn." Tuj komenciĝas stranga vidaĵo.

La knaboj demetis siajn kolumojn kaj manumojn, pendigis ilin sur la gaspiron, kaj ĵetis naztukojn kaj aliajn tolaĵojn sur la piron, kie ili pendigis.

Samtempe oni estingis la gason por malheligi la ĉambron, poste oni alportis kandelington kaj ekbruligis kandeleton; tial la ĉambro iom reheligis.

Baldaŭ la poŝoj malpleniĝis kaj sur la litojn



## WHAT HAPPENED TO HARRY.

Harry Longfellow was not extremely happy one Tuesday, for he had just left home and come to school for the first time. He had found the day very long, and during (through) its whole length he had felt very nervous and awkward. When the schoolmaster said to him—"Write your name here," he put his penholder without a pen into an inkpot without ink, let his pencil-box fall, broke his pencils, and when they asked him, "In what does the richness of Ireland consist?" he answered—"In the quantity of cigar-cases and cigar-holders made there." Now he was in the dormitory with twenty strange boys. His nervousness and strangeness were still the greater because he was the only child of his parents. "Shorty," said a little boy, who had just stood up on the bed and put another boy there near him. All heads turned to Harry, who with difficulty understood that they were calling him "Shorty." The little boy continued loudly, "When a new boy comes to our dormitory, we always show the contents of our pockets, and I always divide them again. Ho! now you must all empty your pockets together." Immediately a strange sight commenced. The boys took off their collars and cuffs, hung them upon the gas-bracket, and threw handkerchiefs and other cotton things upon the pipe, where they caught (became hung). At the same time they put out the gas to darken the room; afterwards they brought a candlestick and lighted a little candle, thus the room was a little light again (became re-lighted).

Soon the pockets were emptied, and upon the

kolektiĝis monujo senmonera, paperujo, skribil-  
 ujoj, plumingoj, snureto, kraĵonoj, kraĵonujoj,  
 tranciletoj, k.t.p. Unu knabo havis en sia poŝo  
 sukeraĵon malpuran, li ekpurigis ĝin per akvo el  
 la lavvazo, sed ĉar ĝi estis krema sukeraĵo la akvo  
 malsekigis ĝin kaj ĝi fludiĝas; la aliaj knaboj moke  
 ekkriis pri lia malsaĝeco kaj diris, ke li devas aĉeti  
 acidajon, kies acideco ne estas tro forta. Henĉjo  
 staris senmove, li ne plenumis la ordonon de la  
 knabeto. Estis en lia monujo multe da mono por  
 la elspezoj de la tuta trimestro, kaj li ne volis  
 malplenigi sian poŝan; li tamen sentis sin tre timema.  
 La knabeto krias, "Rapidu! rapidu! ni devas kanti,  
 ĉar ni estas kantemaj knaboj kaj ŝatas la kantadon  
 kaj la dancadon. Alportu al mi ŝnuron! ni devas  
 pendigi tiun ĉi knabon, por ke ni vidu dancantaj  
 liajn krurojn." Subite la knaboj sin ĵetis sur lin  
 kriante, ke li jam trouzis ilian paciencon, bonecon,  
 afablecon, amikecon, k.t.p. "Ni estas rusoj el Rusujo,  
 angloj el Anglujo, germanoj el Germanujo kaj vi  
 insultas nin!" Li paliĝis, liaj okuloj fermiĝis kaj li  
 timis esti mortigata. Sed ho! granda feliĉeco.  
 Henĉjo, subite malfermis la okulojn kaj sentis kun  
 granda ĝojo, ke li estas hejme en sia propra lito—

Estas ja nur malagrabra sonĝo.

E.A.L.

beds were collected a purse without money, a paper-case, pen-boxes, penholders, string, pencils, pencil-cases, pocket-knives, etc. One boy had in his pocket some dirty sweets; he began to clean them with water from the wash-hand basin, but being a cream sweet the water wetted it and it dissolved. The other boys mockingly cried out about his stupidity, and said that he ought to buy acid drops whose acidity was not too strong. Harry stood without moving, he did not fulfil the order of the little boy. In his purse he had (much) the money for the expenses of the whole quarter, and he did not wish to empty his pocket; but nevertheless he felt very frightened. The little boy cried out—"Hurry! hurry! We must sing, because we are boys who are inclined to sing, and love singing and dancing. Bring me a rope; we must hang this boy in order to see his legs dance." Suddenly the boys threw themselves upon him crying that he had already used too much of their patience, goodness, affability, friendship, etc. "We are Russians from Russia, English from England, Germans from Germany, and you insult us." He turned pale, his eyes closed, and he feared to be killed. But ho! great happiness. Harry suddenly opened his eyes, and realized with great joy that he was at home in his own bed—

It was only an unpleasant dream.

## LA LETERO AL LA REKRUTO.

DE HENDRIK CONSCIENCE.

Tradukis RAYM. VAN MELCKEBEKE.

*Hendrik Conscience estas rajte ŝatata kiel la restariginto de la proza literaturo en Flandro. Li sukcesegas en skizado de scenoj el popola vivo.*

Apud la Zoersela arbaro staris, flanko ĉe flanko du argilaj dometoj, izolitaj kaj nerimarkataj.

En unu el ili loĝis malriĉa vidvino, kun sia filino (Katarino); ili posedis, kiel solan bienon sur la tero, nur unu bovinon. En la alia dometo loĝis ankaŭ vidvino kun sia maljunega patro kaj du filoj.

Simplaj, nesciantaj ĉion kio okazas ekstere inter la laboradanta homaro, ili vivadis kontentaj je la peco da sekala pano donacita de Dio.

Sed tiu ĉi kvieta, feliĉa vivado estis interrompita per la foriro de la rekrutoj. Johano ankaŭ devis foriri kun la aliaj junuloj. Li ofte skribadis al sia familio sed subite la korespondado ĉesis.

La loĝantoj de la du dometoj pli kaj pli malkvietigis kaj tiam Katarino prenis la heroan decidon skribi leteron al Johano. Ŝi ja de longe estis forgesinta la lecionojn pri skribarto kiujn ŝi ricevis, sed ŝi reprenis siajn kajerojn el la malnova kesto kaj relernis la skribadon.

Poste ŝi aĉetis en la vilaĝo leterpaperon, inkon kaj plumon . . .

\* \* \*

La du vidvinoj sidis apud la tablo, senpacience atendente la revenon de Katarino. La maljuna avo suferanta pro malvarmo kuŝis en la lito en la alkovo

kaj montris la kapon el la kurtenoj por ĉeesti, almenaŭ per okuloj kaj oreloj, ĉe la grava ekfarota laboro.

Tuj kiam la filino sin montris sur la sojlo, la virinoj rapidege kolektis la diversajn objektojn kuŝantajn sur la tablo, kiun ili per antaŭtuko purigis.

“Venu, Katarino,” diris la patrino de Johano, “sidiĝu sur la seĝon de la avo ; ĝi estas pli komforta.”

La junulino silente eksidiĝis apud la tablo, kuŝigis la paperfoliojn antaŭ si kaj, revanta, ŝi metis la pinton de la anserplumo inter siajn lipojn . . .

Dume la virinoj kaj la avo sciame alrigardis la pripensantan junulinon. La frateto estis apoginta la brakojn sur la tablo kaj mire rigardis ŝin por observi tion kion ŝi estas faronta per la plumo.

Sed Katarino sin levis kaj, ĉiam silente, prenis el la ŝranko taseton, verŝis en ĝin la inkon el la boteleto kaj residiĝis apud la tablo, kie ŝi multfoje turnis kaj returnis la paperon.

Fine ŝi glitigis la plumon en la inkon kaj kliniĝis kvazaŭ ŝi estis ekskribonta. Post momento ŝi levis la kapon kaj demandis :

“Nu, diru nun kion mi devas skribi ?”

La du vidvinoj demande rigardis unu la alian kaj sin turnis al la malsano avo.

“Nu, skribu ke ni ĉiuj bone fartas . . .,” diris la maljunulo tusante, “letero ĉiam tiel komenciĝas.”

La junulino rimarkigis kun dolora rideto :

“Ho! kion vi volas! skribi ke ni ĉiuj bone fartas . . . kaj vi kuŝas tie malsana jam de dekkvin tagoj.”

“Sed vi povas tamen diri tion en la fino de la letero, Katarino.”

“Ne, filino, jen kiel vi devas fari,” diris la patrino de Johano, “komencu, demandante kiel li fartas.”

“Ne, infano mia,” diris la alia vidvino, “skribu unue ke per la mano vi prenas la plumon por peti informojn pri lia saneco. Tiamaniere komenciĝis

ankaŭ la letero de Baptisto, la filo de Petro-Johano, kiun hieraŭ mi aŭdis legatan ĉe la muelisto.”

“Mi neniel faros tion,” senpacience diris la junulino, “Johano nature scias ke mi ne povas skribi per la piedoj!”

“Skribu nun unue lian nomon supre sur la papero,” diris la avo.

“Kian nomon? *Braems?*”

“Tute ne: *Johano!*”

“Vi estas prava, patro,” respondis la junulino. “For, Paŭĉjo! formetu viajn brakojn de la tablo, kaj vi, patrino, sidiĝu iom malantaŭe, ĉar mi konvinkigas ke vi puŝos min.”

Ŝi direktis la plumon al la papero kaj, elektante la lokon kie ŝi ekskribos, ŝi mallaŭte silabis la nomon de la forestanta amiko.

La patrino de Johano subite stariĝis kaj kaptis la manon de la junulino dirante:

“Atendu iom, Katarino, ĉu vi ne opinias ke *Johano* tutsole ne taŭgas? Estas tiel mallonge; oni devus aldoni ion. Ĉu vi ne skribus prefere: *Amata filo* aŭ *Kara infano?*”

Katarino preskaŭ ne aŭdis tiujn vortojn; ŝi okupadis sin lekante la paperon, — kaj ŝi kriis iom kolere:

“Nu, jen estas la rezultato: grandega makulo sur la papero! kaj la lekado ne utilas: ĝi tamen ne malaperas. Mi uzos do alian folion.”

“Nu, kion vi diras pri tio: *Amata filo?* Ĉu tio ne estas multe pli bela?”

“Ne, tion ankaŭ mi ne volas skribi,” murmuris malkontente Katarino. “Ĉu mi do skribus al *Johano* kvazaŭ mi estas lia patrino?”

“Sed kion vi skribos do?”

Ia rozkoloro aperis sur la vangoj de la junulino dum ŝi respondis:

“Se mi skribus: *Kara Amiko?* Ĉu tio ne ŝajnas al vi la plej bona esprimo?”

“Miaflanke mi ne volas tion,” diris ŝia patrino, “diru tiam prefere nur *Johano*.”

“*Kara Johano?*” demandis la junulino.

“Jes, tiel estas bone!” respondis ĉiuj kune, kvazaŭ ili estas ĝojaj pro la solvo de tiu malfacila problemo.

“Nun! ne tuŝu la tablon,” kriis la junulino, “kaj tenu Paŭĉjon por ke li ne puŝu min!”

Katarino eklaboris. Post unu minuto ŝvitgutetoj ekbrilis jam sur ŝia frunto; ŝi haltigis la spiradon kaj ŝia vizaĝo varmiĝis. Ŝi profunde ekspiris kaj, kvazaŭ liberigita de peza ŝarĝo, ŝi gaje ekkriis:

“Uf! Tiu *K* estas vere la plej malfacila letero el ĉiuj! Sed tamen ĝi kuŝas tie kun sia longa buklo!”

La ambaŭ virinoj leviĝis kaj mirante rigardis la literon kiu estis almenaŭ tiel granda kiel fingroparto.

“Tio estas stranga!” kriis la patrino de Johano; “ĝi estas objekto kiel vespo; kaj tio signifas *Kara Johano!* Skribi estas tamen mirinda sciio; oni dirus preskaŭ ke tio estas sorĉaĵo!”

“Nu, mi, lasu min daŭrigi,” diris Katarino, “kun kuraĝo mi atingos la celon. Se tiu plumo ne tiel ŝprucigus! . . .”

Kiam, post kelka tempo, la unua linio estis plenskribita per grandaj literoj, la junulino haltis en sia laboro.

“Diru Katarino ĝis kie vi jam alvenis?” demandis la patrino de Johano. “Vi legu do al ni ĉion kion vi jam skribis sur la papero.”

“Kiel vi rapidas!” ekkriis Katarino. “Sur la papero sin trovas nur *Kara Johano*—Paŭĉjo (little Paul) ne tuŝu plu la inkon aŭ tuj vi elversos la taseton.”

Dum duonhoro ĉiuj silentadis. Ŝajnis ke la laboro pli facile daŭriĝas, ĉar la junulino iafoje ridetis dum sia skribado.

Ŝin nur distris Paŭĉjo, kiu estis kolorinta sian tutan

brakon nigra kaj metis nun siajn kvin fingrojn samtempe en la inkon. Jam dekfoje Katarino glitigis la taseton de unu al alia rando de l' tablo, sed la knabeto estis tiel allogata de la inko ke estis neeble forteni lin de ĝi.

Tamen la du unuaj paĝoj de la papero estis plenskribitaj. Cedante al la postuloj de la virinoj, Katarino kun ia fiereco eklegis sian skribaĵon, kiu estis la jena :

*Kara Johano,*

“Kiel vi fartas nun? Dank’ al Dio ni ĉiuj  
 “ankoraŭ bone fartas kaj la bovo kaj la bovino  
 “ankaŭ, esceptinte tamen la avon, kiu estas malsana,  
 “kaj ni, ĉiuj ni deziras al vi bonan tagon. Jam de  
 “ses monatoj ni nenion aŭdis pri vi. Sciigu do al  
 “ni, ĉu vi vivas ankoraŭ. Viaflanke ne estas ĝentile  
 “ke vi forgesas nin, kiuj tiel amis vin ke via patrino  
 “dum tuta la tago parolas pri vi, kaj ke mi ĉiunokte  
 “pri vi songas ke vi estas malfeliĉa—kaj tiam mi  
 “aŭdas vian voĉon vokantan : *Katarino, Katarino*, tiel  
 “forte ke mi eksaltas en mia dormado . . . kaj la  
 “kompatinda bovo, kiu ĉiam el la stalo rigardas kaj  
 “tiel sopiras ke oni preskaŭ ekverŝus larmojn ! kaj  
 “estas ega malĝojo tial ke neniu el ni ion scias pri vi :  
 “vi devas kompati je ni, Johano, ĉar via bona  
 “patrino pro tio certe ekmalsaniĝos ; kiam la kom-  
 “patinda malfeliĉulino aŭdas eĉ nur vian nomon, ŝi  
 “ekĝemas kaj tiel ploras ke mia koro disrompiĝas . . .”

“Ho ! tio estas nur la vero,” ĝemis la patrino de Johano. “Ha ! se li sciis kion mi suferas en mia koro ! . . . Daŭrigu vian legadon, kara Katarino ; mi miregas pro tio kion vi skribis : neniam io simila estis aŭdata ; viaj manoj estas certe tro lertaj por melki la bovinon aŭ labori en la kampo ; sed Dio toleras multe en la mondo ! . . . ”



Gaja pro tiuj laŭdoj la junulino diris kun fiera rideto :

“Se la skribarto estus nur tio ! Ĉiu ajn venu : mi skribos pli bone ol iu ! Nun mi trovis la bonan vojon. Nu, aŭskultu, mia letero ne estas ankoraŭ finita :

“Ho ! Johano, se vi sciis tion, tuj vi donus al ni “sciigojn ! La trifolioj malsukcesis pro la malbona “semo kaj plie tial ke ili estas frostitaj. La kampo-“gardisto edziĝis kun vilaĝanino el Pulderbosch, ŝi “posedas multe da mono. Francisko la masonisto “falas de la tegmento de la bierfaristo sur la dorson “de nia maljuna forĝisto, kaj la forĝisto estis preskaŭ “mortigita, malfeliĉe !”

La junulino silentis.

“Ĉu tio estas ĉio ?” demandis la patrino malĝoje.  
“Ĉu vi ne sciigus al li ke la bovino naskis idon ?”

“Ho jes ! tion mi forgesis. . . . Jen, tio sin trovas jam sur la papero :

“Nia flavruĝa bovino naskis idon ; ĉio bone suk-“cesis, kaj la bovino estas jam vendita.”

Ĉiuj gaje ekridis ; la knabeto, vidante la komunan ĝojon, bruege ekaplaŭdis, sed malfeliĉe lia maneto trafis tiel forte la taseton ke ĝi ruliĝis sur la tablo, elverŝante la inkon kiel nigran rivereton sur la belan leteron.

La rido tuj malaperis de ĉiuj vizaĝoj ; unu rigardis la alian timeme kaj silente ; oni levis la okulojn ĉielen dum Paŭĉjo, timegante la baton, jam ekplo-regis kaj kriis tiel forte ke la oreloj estis surdigitaj.

Dum longa tempo oni riproĉis la knabeton kaj oni plendis malĝojege pri la katastrofo, ĝis kiam oni konkludis per la demando :

“Dio ! kion ni faros nun ?”

“Nu, nu,” diris Katarino kun decideco, “la malfeliĉo ne estas tiel grava ; mi intencis tamen reskribi la leteron, ĉar en la komenco la afero ne bone pros-

peris ; la literoj estis tro grandaj kaj la skribaĵo estis tro malrekta. Nun mi faros tion pli bone, mi ja ekkuraĝiĝis. Lasu min rapide kuri al la vilaĝo por aĉeti paperon kaj inkon, kaj por ke oni ree tranĉu mian anserplumon ĉar ĝi fariĝis multe tro fleksebla.”

“Nun, tuj foriru, infano mia,” respondis la patrino, “jen estas la kvinfranka monero de la bovido : vi ŝanĝigu ĝin ĉe la instruisto, ĉar mi devos kredeble sendi al mia kompatinda Johano almenaŭ du frankojn.

“— Paŭĉjo, for ! el la domo ! kaj ne kuraĝu reveni antaŭ la vespero !”

Katarino, kun kontenta rideto sur la vizaĝo, elpaŝis rapide el la pordo, sin direktante al la vilaĝo. La triumfo kiun ŝi akiris, la konvinko ke de nun ŝi povos skribi al Johano kaj precipe ia fiereco pro sia scienco, plenigis ŝian koron je dolĉa ĝojo.

*El “Paŭĵoj el la Flandra Literaturo.”*

## PROVERBOJ DE M. F. ZAMENHOF.

Plej granda potenco kuŝas en la komenco.

Kiu semas venton, rikoltos fulmentondron.

Ne ĉio brilanta estas diamanto.

Kiu bojas, ne mordas.

Kastelo en aero—malsato sur tero.

Kiu por ĉiuj laboras, pri si mem ne memoras.

## KELKAJ AVENTUROJ DE BAGH,<sup>1</sup> LA TIGRO.

### VERA RAKONTETO DE TEOĜARDENO EN ASSAM.

Ni jam sciigis pri lia proksimeco je la ĝardeno, sed, dum multaj monatoj, liaj solaj faradoj estis la mortigado kaj manĝado de unu aŭ du ĝardenaj Kulioj<sup>2</sup> (coolies).

De unu kompatinda viro *nenio* estis postlasita krom la kranio, kiu kuŝis mezvoje.

Sed la vilaĝanoj de tiu ĉi parto malfeliĉe tiel kutimiĝis je tia okazo, ke neniu forlasis la vojon. Kaj la kvar Angloj sur nia Ĝardeno kontente vivadis kaj trankvile. Ili estis certegaj, ke la bestoj de Hindujo, kiel ankaŭ la popolo, timiĝus preni la sangon de siaj mastroj, la blankaj homoj.

Nu, venis sezono kiam la cervoj malmultiĝis, kaj maljuna Bagh, kun granda penado apenaŭ trovadis sufiĉan manĝaĵon por konservi sian vivon. Diris li: "Nunatempе estas malbone! Tage la vilaĝanoj promenadas multanombre, kaj dum la mallumo ne aperas. Ofte ili enmetas fajron en la longa herbo, kio tre timigas min." Kaj, je la penso, li ruligis siajn okulojn, nudigis siajn dentojn kaj ekĝemis. "Iafoje, tuta semajno pasas, kaj mi ne vidas eĉ cervon, kvankam mi certe ne sopiras je tia males-timaĵo. Sed estas blanka viro kiu, ĉiutage, forrajdas, kaj ĉiuvespere revenas, preter la vojo. Li kaj lia ĉevalo fariĝus sufiĉa manĝaĵo dum tuta monato. Kiu timiĝas je la blanka viro? Ne mi! mi ankoraŭ trinkos lian sangon!" Kaj Bagh ŝmacis siajn lipojn.

Estas bonekonata fakto ke, post la unua gusto de homa sango, la tigro tre sopiradas je ĝi dum sia vivcetero. De tiam li nomiĝas "virmanĝulo" kaj fariĝas pli terura ol ia alia besto.

<sup>1</sup> Bagh, la Hinda vorto por Tigro.

<sup>2</sup> Hindaj laboristoj.

Tagon, je la krepusko, mi tre surpriziĝis vidi mian kolegon freneze rajdantan en la ĝardenon. Li alvenis senĉapele, senspire, kaj sia vizaĝo aperis kvazaŭ li estus vidinta la Diablon. Efektive granda tigro estis elsaltinta el la ĵunglo.<sup>1</sup> Nature la ĉevaleto pro granda teruro ekforkuris, sed, feliĉe por li, mia amiko povis konservi egalpezon sur la selo. Alie, ni ankoraŭ estus senavizaj—kaj tiel ankaŭ estus la malfeliĉulo!

La sovaĝbesto do ĉasadis lin, sed la ĉevalisto fortege ĵetis sian kaskon poste en la vizaĝon de la besto. Tio videble, faris la deziritan efekton, ĉar li ne plu sekvalidis. Sed la flugulo ne haltis antaŭ ol li alvenis ĉe siaj kolegoj. Niaparte, kvankam ĝi kompreneble estis okazo tro vera, ni ekopiniis la aferon kiel granda ŝerco, kiel bona ridindaĵo. Sed le nervoj de mia amiko estis kvazaŭ detruitaj, kaj eĉ nun ili estas iom malfortaj.

Proksimatage oni eliris por serĉi la kaskon, sed ĝi ne estis trovebla.

“Kaj kion opiniis Bagh?” vi demandas.

Tiu sinjoro estis kuŝinta en la fina stato de senpova frenezo. Pecetoj de la kasko ĉirkaŭis lin. Lia longa vosto batis la subaĵon. Eĉ la lacertetoj timiĝis montri sin, sed ili aŭdis liajn vortojn kaj laŭe tremadis.

“La blankaj viroj ja estas la mastroj de ĉio,” diris Bagh, penante senkulpigi sin. “Se tiu ĉi estus vere Hindo, mi certiĝas, ke mi estus kaptinta lin, ĉar la Hindoj rajdas sur malrapidaj ĉevaletoj. Sed kiu povas ĝiskuri la ĉevalon de la blankulo?”

“Malbenu la blankan homaron!” li blekdiris. “Kial ili venas en tiun ĉi landon? Mi scias, ke ili ne apartenas al ĝi, ĉar, anstataŭ kunloĝadi familie en vilaĝoj, ĉiu loĝas sole en aparta domo, kun multe da Hindoj por atenti lin. Denove, ili alvenas kaj foriras simile al la jar-sezonoj, kaj ĝis nun mi ne vidis iajn inojn aŭ idojn. Sed de kie ili venas, kaj kien ili iras

<sup>1</sup> La dika kreskajaro.

neniu scias! Ne, ili estas senrajtuloj! Krom ili, kiuj estus mastroj de tiu ĉi lando? Tre certege, la tigroj!!”

Kelkminute Bagh pripensadis pri tia feliĉa estado. Tiam li daŭris: “Sed la malbonuloj trairas la kampon sur elefantoj, kaj dissemas morton per tondro kaj fulmo. Kion! Ĉu ili estos permesataj, senrefrape, malsanktigi niajn proprajn loĝejojn? Ha! Mi havas ideon! Mi eĉ vizitos la hejmon de blankulo, kaj venĝos iliajn insultojn. Feliĉe la tuta lando ankoraŭ estas nia proprejo ĉiun nokton kiam ni povas iradi, maltime, kien ajn ni deziras.”

Tiel okazis ke, la proksiman noktomezon mi miregis trovi min tute veka—tre neordinara okazo por mi.

Subite mi sciigis pri laŭta nazspirado ekster la maldikaj muroj. La bruo movadis de pordo al fenestro, de fenestro al pordo, tute ĉirkaŭ la domo. Kelkafoje profunda bleko sonoris—nur bleko de la gorgo, mi supozas. Nu, estas unu afero moki sian amikon ĉar li forkuris de tigo dum la taglumo. Sed, kredis min, estas tute alia afero esti vekata noktomeze de malsata besto, precipe kiam oni memoras ke, se ĝi sciis, ke puŝado de sia frunto aŭ unu bato de sia piedo kontraŭ la fenestro donus al si la deziritan manĝaĵon! Sed la tigo ne atakis la malfortan konstruaĵon kaj mi hodiaŭ povas skribi tiujn ĉi vortojn. Tamen ŝajnis al mi multaj horoj antaŭ ol li foriris.

Post kelkaj tagoj la blankaj viroj venis kun pafiloj kaj elefantoj kaj multe da Hindaj servantoj. Kia glora vidaĵo estis vidi ok grandegajn elefantojn majeste promenantajn tra la longa herbo.

Sed Bagh sukcese kaŝadis sin kaj ne plu estis vidita. Li jam estis forlasinta la ĉirkaŭaĵon, neniam (espereble) por reveni.

A. T. SIMPER.

*El la “Esperantist.”*

## JINGLES

COMPOSED BY MR. ROBERTS TO HELP IN  
MEMORIZING THE CORRELATIVE WORDS.

*I, ti, ki, neni, and cî;*  
Then add *a* for "quality,"

*Al* for "motive,"

*Am* for "time,"

*E* for "place" — excuse the  
rhyme—

"Manner," *el*; possessive *es*—

Which must really rhyme with  
face—

"Thing" takes *o*; *om*, quantity;

"Individual," *u* must be.

Typical Words.

Some, or any,  
kind of, *ia*.

Why, *Kial*.

When, *Kiam*.

Where, *Kie*.

How, *Kiel*.

Whose, *Kies*.

A little, "*iom*."

Who, *Kiu*.

*N.B.*—The above is only a mnemonic jingle, and from a grammatical point of view is not correct. The above syllables do not exist in the Vortaro, or have not the meanings given here. The correct forms are *ia, tia, kia, nenia, cîa*, etc.

[*Referring to the proposal (now an accomplished fact) that the London County Council should approve the teaching of Esperanto in its Schools.*]

### THE NEW BILINGUALISM.

Do not pack in your portmanteau  
 Books of classic verse ;  
 Purchase guides to Esperanto,  
 Manuals of Erse.  
 Fogazzaro's tale *Il Santo*,  
 Walpole's *Castle of Otranto*,  
 Dante's most inspiring canto,  
 Grow more fine, more terse,  
 Rendered into Esperanto,  
 Versified in Erse.

From Lahinch to far Lepanto,  
 If equipped with Erse,  
 And in fluent Esperanto  
 Able to converse,  
 You will fare without confusion  
 Over land and sea—  
 Such at least is the conclusion  
 Of the L.C.C.

(PUNCH, *October*, 1906).

## LA HIMNO “ ESPERO.”

En la mondon venis nova sento,  
 Tra la mondo iras forta voko ;  
 Perflugiloj de facila vento  
 Nun de loko flugu ĝi al loko.  
     Ne al glavo sangon soifanta  
     Ĝi la homan tiras familion :  
     Al la mond' eterne militanta  
     Ĝi promesas sanktan harmonion.  
 Sub la sankta signo de l' espero  
 Kolektiĝas pacaj batalantoj.  
 Kaj rapide kreskas la afero  
 Per laboro de la esperantoj.  
     Forte staras muroj de miljaroj  
     Inter la popoloj dividitaj ;  
     Sed dissaltos la obstinaj baroj  
     Per la sankta amo disbatitaj.  
 Sur neŭtrala lingva fundamento,  
 Komprenante unu la alian,  
 La popoloj faros en konsento  
 Unu grandan rondon familian.  
     Nia diligenta kolegaro  
     En laboro paca ne laciĝos,  
     Ĝis la bela sonĝo de l' homaro  
     Por eterna ben' efektiviĝos.

D<sup>o</sup>. L. L. ZAMENHOF.



**Translation.**

A new sentiment has come into the world,  
 A mighty voice goes through the earth,  
 On wings of light wind

Let it now fly from place to place.

Not to the blood-thirsty sword  
 Does it draw the human family :

To the ever-warring world

It promises a holy harmony.

Beneath the sacred banner of hope

Peaceful warriors gather,

And the work shall spread rapidly

By the labours of the hopeful.

The walls of centuries firmly stand

Between the divided peoples ;

But the obstinate bars shall give way

Beaten down by holy love.

Upon the foundation of a neutral language,

Understanding one another,

The peoples will form, with one accord,

One great family circle.

Our diligent adherents

Will not become weary in their peaceful labour

Till the fair dream of humanity

Is realised as an eternal blessing.

*The official music was composed by M. de Menil, and  
 is to be obtained at the British Esperanto Association,  
 13, Arundel Street, Strand.*

## KANTO DE STUDENTOJ.

(GAUDEAMUS (*see page 10*)).

Ĝoju, ĝoju ni, kolegoj,  
Dum ni junaj estas!  
Post plezura estanteco,  
Post malgaja maljuneco—  
Sole tero restas.

Vivu la akademio  
Kaj la profesoroj!  
Vivu longe kaj en sano  
Ĉiu akademiano,  
Vivu sen doloroj!

Vivu, floru nia regno  
Kaj regnestro nia!  
Kaj amikoj mecenataj,  
Protegentoj estimataj  
De l' akademio.

Vivu ĉiuj la knabinoj  
Belaj kaj hontemaj!  
Vivu ankaŭ la virinoj,  
Amikinoj kaj mastrinoj,  
Bonaj, laboremaj.

Mortu, mortu, malgajeco,  
Mortu la doloro!  
Mortu ĉiu intriganto  
Kaj malamon konservanto  
Longe en la koro!

L. L. ZAMENHOF.

## LA CELO ESPERANTA.

“Unu lingvo, unu koro!”—jen deviz’ de nia cel’;  
 Ni elfaru veran eston al antikva la fabel’  
 Kiam per la sama lingvo paroladis hom’ kun hom’  
 Pace, iu al alia, el diversa gent’ aŭ dom.’

Tio eble estis fablo; tamen ĉe la nuna scen’,  
 Pleje la malpac’ ekkreskas nur el akra malkompren’;  
 “Scii estas senkulpigi”—baldaŭ ĉesus militad’,  
 Se nacioj kunparolus per komuna parolad’.

Do klopodu ni konstante por nacia amikec’,  
 Per la lingva unuiĝo de la homa frata spec’;  
 Plimultigu ni la penojn kaj la simpation, ĝis  
 Plenumiĝos rev’ poeta per la tutamonda kis’.

*El la “British Esperantist.”*

BEN ELMY.

[*Sung to the tune of the Austrian National Hymn  
 (Glorious Things of Thee are Spoken).*

*For the tune of “Gaudeamus” see Farmer’s Student  
 Songs, or enquire of MISS LAWRENCE.]*

## NOVA KANTO.

Ho ! eksonu nova kanto  
 Pri la lingvo Esperanto,  
 Pri ligil' internacia,  
 Revo nia, amo nia !  
 Kreitaĵ' la plej mirinda,  
 Vere estas ĝi laŭdinda  
 De verkistoj, de poetoj,  
 En poemoj kaj odetoj.

*Ĥoro* : Ho, eksonu nova kanto  
 Pri li lingvo Esperanto.

Pli ol tondro de bataloj,  
 Pli ol dolĉaj najtingaloj,  
 Pli ol belaj aktorinoj,  
 Pli ol fajfoj de maŝinoj,  
 Pli ol ora la plej brila,  
 Pli ol gloro senutila,  
 Pli ol ĉiu, pli ol ĉio,  
 Krom la amo kaj la Dio.

*Ĥoro.*

Dum venonta la centjaro,  
 Sciu esperantistaro,  
 En Eŭropo, Ameriko,  
 En Azio kaj Afriko,  
 Kie ajn vi veturados  
 Esperanton vi trovados,  
 Sur la strato, en vagono,  
 En hotelo, en salono.

*Ĥoro.*

Kaj eĉ en privata domo :  
 Ĝin parolos ĉiu homo :  
 Laboristo, profesoro,  
 Kaj juĝisto, kaj doktoro,  
 Kaj hebreo, kaj kristano,  
 Kaj litovo kaj japano,—  
 Kaj pereos la plendato :  
 “Mi vin ne komprenas, frato.”

*Ĥoro.*

Iru kiel apostoloj  
 Ĝin prediki por popoloj.  
 Kaj eksonu nia voko  
 Sur la ter' en ĉiu loko,  
 En vilaĝoj, en urbetoj,  
 En lernejoj, en gazetoj,  
 Kaj servantajn al la vero  
 Nin fortigu la Espero.

*Ĥoro.*

DOMBROWSKI.

*Eltirita el “Fundamenta Krestomatio.”*

[Tune arranged by ARTHUR TRICKETT. To be  
 obtained from the London Esperanto Club, 14, Norfolk  
 Street, Strand, W.C.]

Ŝafo donas sian lanon,  
 Por ke mastro havu. panon.  
 Kiu ĉion senpripense parolas,  
 Aŭdos tion, kion li ne volas.  
 Vivu, progresu,  
 Sed lerni ne ĉesu.

## AL LA REĜO.

(GOD SAVE THE KING).

Vivu la reĝ' al ni, tre longe vivu li!  
 Gardu lin Di'!  
 Justa kaj pia reĝ', —Dio pro nia preĝ'  
 Estu kun li.

Forta la reĝa tron', ver' estas lia kron',  
 Glavo la leĝ'.  
 Kun amo en la kor', reĝas kun granda glor' . . .  
 Vivu la reĝ'!

Brulu, ho sankta flam' de la eterna am'  
 Pro la patruj'!  
 Kaj forte staros ni, ĉiuj por unu li  
 Pro la patruj'!

Longe, ho, restu vi, gloro de la naci',  
 Sur reĝa seĝ'!  
 Via plej granda glor' en la popola kor',  
 Vivu la reĝ'!

D<sup>o</sup>. ZAMENHOF.

## TINY TIM'S CHRISTMAS DINNER.

[From DICKENS' "CHRISTMAS CAROL."]

Tiam Sinjorino Cratchit leviĝis; ŝi estis malriĉe vestita, sed gaje dank' al rubandoj diverskoloraj; kaj ŝi, kune kun Belinda, ŝia dua filino, primetis la tablon. Kaj nun enkuris du pli malgrandaj Cratchits, geknaboj, kiuj kriis ke ili, ekster la bakejo, flaris la anseron kaj ĝin konis kiel ilia propra ansero per laodoro! Ili ĝojis tiel, dancante ĉirkaŭ la tablo, kaj pensante pri salvio, kolbasoj, kaj bulboj, dum Sinjoreto Peter Cratchit zorgis pri la terpomoj kaj blovis la fajron, ĝis fine la terpomoj estis pretaj por esti senŝeligataj. Tamen Sinjoreto Peter ne estis tro vanta, kvankam li portis kolumon tre altan por fari honoron al la Tago.

"Kial do via patro tiel malfruas?" diris Sinjorino Cratchit—"kaj via frato, Eta Tim, ankaŭ? Kaj Martha ne tiel malfruis je duonhoron la lastan Kristnaskon!"

"Jen Martha, patrino!" ekkriis filineto.

"Jen Martha, patrino!" ekkriis la du pli junaj Cratchits.

"Hura! estas tiel granda ansero, Martha!"

"Nu! kiel vi venas malfrue!" kriis Sinjorino Cratchit, ŝin kisante dekdufoje, kaj forprenante ŝian ĉapelon kaj ŝalon.

"Ni devis multe labori por fini nian taskon," diris la knabino.

"Nu! ne estas grave! Sidiĝu antaŭ la fajro, karulino, kaj varmigu vin!"

"Ne! ne! jen patro!" kriis la du junaj Cratchits, kiuj estis ĉie samtempe. "Kaŝu vin, Martha, kaŝu vin!"

Tiam Martha sin kaŝis, kaj la malgranda Bob, la patro, envenis kun almenaŭ tri futoj da lana skarpo pendanta antaŭ li, kaj kun eluzitaj vestoj, flikitaj kaj brositaj, portante Etan Tim'on sur sia ŝultro. Ho ve ! Tim havis lam-bastoneton, kaj liaj membroj estis subportataj per fera trabaĵo !

“Ho ! kie estas nia Martha !” kriis Bob, ĉirkaŭrigardante.

“Ŝi ne povas veni,” diris la mastrino.

“Ne veni !” ripetis Bob, kaj lia energio subite falis, ĉar revenante hejmen li estis kurinta kiel milita ĉevalo de Eta Tim, . . . “Ĉu ŝi ne venos je Kristnasko !”

Martha ne povis elporti lin vidi malkontenta, eĉ nur ŝerce, kaj ŝi tuj elvenis, el post la pordo, kaj lin ĉirkaŭprenis ; dume, la ambaŭ junaj Cratchits portis Etan Tim'on al la kuirejo, por ke li aŭskultu la pudington, siblantan en la kaserolo.

“Kaj kiel kondukis Eta Tim ?” demandis la mastrino, tuj kiam Bob estis sufiĉe kisinta sian filinon.

“Tre bone,” respondis Bob. “Sed li fariĝas pripensa, tial ke li estas tiel ofte sola, kaj li havas la plej strangajn pensojn. . . . Li diris al mi, revenante, ke li esperas ke oni lin vidis en la preĝejo, ĉar li estas kriplulo kaj tiel oni povis ĝoje memori, je Kristnasko, tiun, kiu igis lamulojn marŝi kaj blindulojn vidi !”

La voĉo de Bob tremis kiam li tion diris, kaj pli forte ankoraŭ kiam li aldonis, ke Eta Tim fortiĝis nun. . . . La aktiva lam-bastoneto aŭdiĝis sur la planko, kaj Timo revenis, akompanata de sia frato kaj de sia fratino, al la benketo apud la fajro ; kaj Bob relevis siajn jakmanikojn (kvazaŭ eble ili povus fariĝi pli eluzitaj, malfeliĉulo !) kaj miksis ion varmegan en kruĉo, movis ĝin per kulero, kaj ĝin metis sur la fajron por boleti. Tiam Sinjoreto Peter kaj



la du junaj Cratchits iris por alporti la anseron, kaj baldaŭ revenis en ĝoja procesio !

Tiel multe ili tumultis, ke vi estus pensinta ke ansero estas inter ĉiuj birdoj la plej kurioza ; kaj, kompreneble, en tiu dometo ĝi vere estis malofta. Sinjorino Cratchit varmigis la sukon ; Sinjoreto Peter forte disprenis la terpomojn ; Fraŭlino Belinda sukeris la pomsaŭcon ; Martha viŝis la varmajn telerojn ; Bob sidigis Etan Tim'on apud lin ĉe la tablo ; la du junaj Cratchits metis seĝojn por ĉiuj, por si mem ankaŭ ; kaj ili tiam puŝis la kulerojn en siajn buŝojn por ke ili ne krii antaŭ ol ili laŭvice estos servitaj.

Fine ĉio estis preta, kaj oni petis la benon de Dio. Paŭzo sekvis, dum la sinjorino ekzamenis la tranĉilon kaj sin preparis por enpuŝi ĝin en la bruston de la birdo kaj kiam ŝi tion faris, kiam la internaĵo, elpuŝiĝis, ĉiuj gajiĝis, kaj eĉ Eta Tim, ekscitata, batis la tablon per sia tranĉil-tenilo kaj malforte kriis :

“Hura !”

Neniam oni vidis tian anseron ! Bob diris, ke li kredas ke neniam tia ansero estos kuirita ! Ĝia moleco kaj gusto, ĝia amplekso kaj malkareco, estis temoj de grandega admiro. Kun pomsaŭco kaj terpomoj, ĝi sufiĉis por la tuta familio ; eĉ, kiel la sinjorino ĝoje diris (rigardante unu malgrandetan atomon ostan sur la plado), ili ne ĝin tute formangiĝis fine ! Tamen ĉiuj satis.

Sed nun, post kiam la teleroj estis ŝanĝitaj de Fraŭlino Belinda, Sinjorino Cratchit sole forlasis la ĉambron—tro nerva por toleri atestantojn—por iri al la pudingo kaj ĝin enporti. . . .

Ho ! ĉu ĝi estas sufiĉe kuirita ? Ĉu ĝi ne disrompiĝos, kiam ŝi elturnos ĝin ! Ĉu iu ne suprenrampis la muron por ĝin ŝteli, dum ili manĝis la anseron ! Oni imagis ĉiajn specojn de teruraĵoj. . . .

Ho ! kiom da vaporo ! la pudingo estis eltirata el

la kaserolo . . .odoro kvazaŭ de lavejo ! tio estis la pudingtuko . . .odoro simila al tiu de restoracio, de kukejo kaj de lavejo kune ! tio estis la pudingo ! . . . Envenis tuj Sinjorino Cratchit, ruĝigante kaj ride-tante fiere, kun la pudingo, simila al makulita kuglego, tiel malmola, brilanta en brando flamanta, kaj ornamita de ileksa branĉo, kiu supre staris.

Ho ! kia mirinda pudingo ! Bob Cratchit diris, kaj tre trankvile, ke li ĝin rigardas kiel la plej granda sukceso de la sinjorino de ilia edziĝo ! Sinjorino Cratchit diris ke, nun kiam ĉio bone okazis, ŝi kon-fesas ke ŝi ne ĝuste sciis ĉu la kvanto da faruno estos sufiĉa. Ĉiuj ion diris pri tio, sed neniu diris aŭ pensis ke la pudingo estis tro malgranda por granda familio. Estus herezo ĝin fari. Ĉiuj hontus havi tian penson !

Fine la tagmanĝo finiĝis ; oni forportis la tablo-tukon, balais la fajrejon, kaj revivigis la fajron. Poste la miksaĵo en la kruĉo estas gustumata kaj perfektigata, oni metis pomojn kaj oranĝojn sur la tablon, kaj multe da kaŝtanoj sur ŝovelilon sur la fajro. Tiam la tuta familio sidiĝis ĉirkaŭ la fajro, kaj apud la kubuto de Bob estis la tuta familia glasaro . . . du glasoj kaj unu taso sen tenilo. Tamen ili enhavis la kruĉan miksaĵon tiel bone kiel pokaloj oraj estus ĝin enhavintaj ! kaj Bob disdonis ĝin ĝoje, dum la kaŝtanoj sur la fajro bruege kraketis kaj siblis. Tiam Bob diris : “ Mi proponas ‘ Ĝojan Kristnaskon ’ al ni ĉiuj, miaj karaj ! Dio nin benu ! ” Kaj la tuta familio ripetis tion.

“ Dio nin benu ! ĉiujn ! ” diris Eta Tim, laste.

*El “ Kristnaska Sonorado ” (Christmas Carol).  
Esperantigita de MARTYN WESTCOTT.*

## KRISTNASKO EN SVEDUJO.

La tagoj fariĝas ĉiam pli mallongaj en mia norda patrujo : ĉiam pli frue venas la krepusko. Sed ni ne plendas, ĉar ju pli profunda fariĝas la vintra mallumo, des pli proksima estas Kristnasko, la festo de l' hejmo, de l' infanoj, de l' ĝojo kaj de l' lumo—la festo, kiun ni, Svedoj, amas pli ol ĉiun alian.

Kiom ajn malproksimen ni migradas en la mondo, se estas nur iel eble ni ĉiam revenas por soleni tiun ĉi feston kun nia familio, kaj la grandaj Amerikaj vaporsipoj ĉiujare rekondukas milojn kaj milojn da Svedoj, kiuj fondis novajn hejmojn trans la oceano. Ili riskas ventegojn kaj ondojn furiozajn, volonte elspezante la monon, kiun tiel malfacile kaj klopode ili akiris, por reiri "la malnovan landon," kiel karese ili nomas sian karan Svedujon, kaj soleni "Jul" en la hejmo de sia infaneco. La sumo de la poŝtaj mandatoj, kiuj venas el Ameriko, estas tri fojojn pli granda dum la monato Decembro. Se oni ne povas veni mem, oni sendas kiom eble plej multe da mono por ke "la maljunuloj hejme" havu ĝojan Kristnaskon.

Sennombraj estas la preparoj kiujn tiu ĉi festo postulas, kaj la sinjorinoj estas okupataj de l' frua mateno ĝis malfrue nokte dum pli ol du semajnoj antaŭe. La manĝaĵoj estas plej diversaj, sed mi timas ke kelkaj el ili estas tro ekskluzive svedaj por ke ili plaĉu al la gusto internacia. Sufiĉe estas diri, ke en la plej multaj domoj en la kamparo oni buĉas almenaŭ unu porkon kaj unu bovidon, ofte ankaŭ unu bovon. Poste, la tuta domo estas plej bele aranĝita, kaj la metalaj objektoj brilas kiel la suno mem. Dum la lastaj tagoj oni bakas ĉiujn specojn da pano, kukaĵoj taj tortoj, kiuj apartenas al la sveda Kristnaska tablo.

Fine do alvenas la granda tago, la 24<sup>an</sup> de Decembro, kaj nun ĉio estas preta kaj en la tuta domo regas la sento de infana ĝojo kaj feliĉo, kiu karakterizas

tiun ĉi feston. Sed sur ĉiuj vizaĝoj oni rimarkas esprimon de atendo! La infanoj ĉiuminute elrigardas tra la fenestroj kaj la gepatroj ŝajnas tiel same ekscitataj kiel la junularo. Subite oni aŭdas pezajn paŝojn en la antaŭĉambro, kaj kiam estas malfermita la pordo, jen, oni ĝin vidas la belan, altan, verdan abion, kies krono preskaŭ tuŝas la plafonon, kaj, kune kun tiu ĉi simbolo de eterna espero, Kristnasko eniras niajn hejmojn kaj korojn. La Kristnaska arbo—Julgranen—estas metata en la plej granda ĉambro, kaj ĉiuj estas baldaŭ okupataj por ornamigi ĝin kun kandletoj, sukeraĵoj kaj bela artefarita neĝo. Ĉe ĝia plej alta branĉo flirtadas la sveda flago—blua kun ora kruco.

Poste oni iras al ta tagmanĝo, kiu ĉe tiu ĉi okazo estas metita ne en la manĝoĉambro, sed en la kuirejo, kaj la familio kaj la servantoj kune sidiĝas je la tablo. Sur tiu ĉi troviĝas specimeno de ĉiu pano bakita, ĉiu manĝaĵo preparita kaj speciala biero, nomata “Julol.”

Sed en la mezo de la tablo staras granda kupra kaserolo enhavanta la supon, en kiu estis kuirata la ŝinko, kiu, rostita kaj ornamita per multekoloraj rubandoj, nun estas la ĉefa ornamaĵo de la tablo. Ĉiu nun prenas pecon da pano sur sia forko, solene ĝin trempas en la kupran kaserolon kaj manĝas ĝin. Tio ĉi estas tre antikva kutimo, kaj oni ofte nomas la 24<sup>an</sup> de Decembro “la tago de l' trempado,” kaj la infanoj jam longe antaŭ Kristnasko komencas kalkuli: “nun estas la tago antaŭ la tago antaŭ la tago antaŭ la tago antaŭ la trempada tago.”

Poste oni eliras por starigi la kutiman faskon da greno sur altan stangon por la birdoj, kaj al la ĉevaloj en la stalo, la brutaro, la kokinoj kaj anasoj — unuvorte, al ĉiuj domaj bestoj — estas donata speciala “festenmanĝo” el aveno kaj tritiko por ke ili ankaŭ sciu “ke nun estas Kristnasko.” En tiu tago oni volas igi ĉiun kaj ĉion feliĉa kaj kontenta, kaj el ĉiu domo oni sendas vestojn, manĝaĵojn kaj

kandelojn al la malriĉuloj. Ĉiu sentas kvazaŭ oni ne povus ĝoji se estus iu en la najbaraĵo, kiu estus malsata aŭ havus nenian kandelon por lumigi sian dometon.

Je la sesa horo oni kunvenas en la salonon por trinki teon kaj poste oni babiladas, kantas, ludas la malnovajn Kristnaskajn ludojn, dancas ĉirkaŭ la Kristnaska arbo kaj manĝas pomojn, nuksojn, sekajn vinberojn, figojn kaj diversajn sukeraĵojn. La vespermanĝo konsistas el speciale preparita fiŝo nomata "lutfisk," rizo kaj buterotortoj. Antaŭ ol manĝi la rizon, ĉiu devas diri malgrandan rimon ŝercau, akompanata de la gaja rido de l' aliaj. Poste estas disdonataj la Kristnaskaj donacoj, ĉiu enmetita en sigelitan poŝtaĵon kun la nomo de l' ricevonto kaj ŝerca versaĵeto. Dum la tuta vespero ĉiuj ĉambroj estas feste iluminitaj, ĉar ĉe Kristnasko ne devas esti ombro ia, nek en la domo, nek en la koro. La kristnaska abio estas pli luma ol ĉio alia, kaj en la dolĉaj radioj de ĝiaj kandeletoj oni momente forgesas la konfliktojn de l' ĉiutaga vivo.

La sekvantan matenon oni ofte devas leviĝi je la kvara horo, ĉar en tiu tago Diservo komencas jam je la sesa horo, kaj multaj devas veturi pli ol 10 kilometrojn ĝis la preĝejo. Kiom estas belege, kiam la glitveturilo rapide antaŭen flugas tra l' arbaro neĝokovrita, dum la steloj ankoraŭ briletas sur nokta ĉielo, kaj oni aŭdas la gajan sonon de centoj da sonoriletoj apartenantaj al aliaj glitveturiloj, kiuj el ĉiuj flankoj alvenas la saman preĝejon. En ĉiu domo, eĉ la plej malgranda kaj mizera dometo, la fenestroj estas iluminitaj per du aŭ kvar kandeloj, kies radioj parolas al la preterpasantoj pri la Festo de Lumo kaj Ĝojo. Kaj en la preĝejo eksonas la malnova Kristnaska himno, "Ni Vin salutis, ho, bela mateno."

*El "Tra la Mondo," la tutmonda ilustrata Revuo esperantista.*

*Originale verkita de FRAŬLINO CEDERBLAD.*

## MI MEM.

## RAKONTITA DE BICIKLO.

*Originale verkita de E. J. FOOKS.*

Mi estas biciklo, kaj ("ne diru ĝin en Gath") mi apartenas al fraŭlino.

Kiam unue mi alvenis hejmen, el la fabrikejo, mi brilis per emajlo, mi brilegis per nikelo, kaj, kompreneble mi ne havis makuleton da koto sur miaj radĉirkaŭkovriloj, nek da rustaĵo sur miaj radietoj.

Mi estis avida por iri, fortega, vigla, elasta, energia, kaj tamen rigida kaj silenta.

Nun, ho, ve! mia kadro bleketas je ĉiu artiketo, miaj radoj kraketas, miaj radietoj estas ellasaj aŭ eĉ mankaj, mia nikelo malheliĝas aŭ forestas, emajlo, selo, kaj ilsaketo, ĉiuj estas eluzitaj.

Mi alvenis hejmen en la frua parto de la nova jaro. Mi ja estis novjara donaco por mia juna mastrino.

Kiel zorge ŝi kutimis min senpolvigi post ĉiu rajdo, kaj viŝi la plej malgrandan makuleton da malseko for de mi, por ke mi ne montru la unuan plej etan signon de rustaĵo.

Hodiaŭ mi staras ekstere, post la domo malpura tiel, kiel mi revenis hejmen de ĉirkaŭkuro antaŭ unu semajno, dum peza tabulo apogas sin kontraŭ miaj radietoj, el kiuj ĉirkaŭ duondekduo mankas.

Unu tagon en Majo, kvin monatojn post mia unua foriro el la fabrikejo, la kuzo de mia mastrino ŝin vizitis, kaj vidante, ke mi apogas min kontraŭ la muro, komencis min surrigardi.

"La antaŭa rado tre ellasiĝis," li diris.

"Ho! ĉu vere," estis la respondo. "Ĉu ĝi forvenos?"

Eble ŝi pensis ke mi estas dento! Sed Henĉjo, la kuzo, ekmontris al mia mastrino kiel mi kraketis en la forkoj, kaj li aminde korektis min. Plie, li altlevis

de la tero mian malantaŭan radon, kaj, metante sian piedon sur la pedalon, igis rapidege turniĝi la radon.

“Nu!” li ekkriis, “tio ĉi bezonas, ke oni oleu ĝin.”

“Ho! Ĉu bicikloj do bezonas oleadon?” estis respondo. “Kie oni metas ĝin?” Kaj, efektive, mi jam antaŭe soifis, pro seka kurado dum pli ol kvar monatoj!

Nu! mi trinkegis fine, kaj urĝe mi ĝin bezonis; sed plu devis okazi.

Henĉjo diris, ke io estas malorda je la malsupra artikolo.

“Kiom pli estas malorda, kaj kion ajn vi intencas per ‘malsupra artikolo’?”

“Nu,” diris Henĉjo, kaj li daŭrigis klarigante pri konusetoj, globetoj, globetkurejoj, k.t.p.

Sed mia mastrino, mi bedaŭras diri, evidente malestimis ĉion ĉi, kaj ne bonvolis respondi al la rimarkoj de Henĉjo, krom diri al li, ke se ŝi ne multe scias pri bicikloj, estis tre malaminde ĉe li ŝin moki, kaj diri al ŝi, ke oni faras biciklojn per kotonaj pingloj!

(Ŝi nur dube aŭdis “koteraj pingloj” [cotter pins]).

Oni malofte min rajdas nune. Mi kutimis stari en vestiblo, sed antaŭ ne longe mia hejmo estis en kelo.

Unu tagon mi aŭdis mian mastrinon diri al amikino, kiu vizitas ŝin por ŝin inviti bicikliri, “Ho! la malnovaĵo bezonas, ke oni ĝin purigu, kaj ŝveligu ĝin, kaj— Ho! enuo! ni iru rigardadi la butikojn!”

\* \* \* \*

Anonco sur ĵurnalo por biciklistoj: “Biciklo de sinjorino vendebla, malkare. Posedanto forlasanta rajdi. Sin turnu al, k.t.p.”

*El “The British Esperantist.”*

## NASKIĜO DE ESPERANTO.

ELTIRO EL PRIVATA LETERO DE D-RO. ZAMENHOF  
AL S-RO. BOROVKO.

*Presita kun permeso da ambaŭ korespondantoj, en  
Jaro 1896.*

*Tradukis el lingvo rusa V.G.*

. . . Vi demandas min, kiel aperis ĉe mi la ideo krei lingvon internacian kaj kia estis la historio de la lingvo Esperanto, de la momento de ĝia naskiĝo, ĝis tiu ĉi tago? La tuta *publika* historio de la lingvo, t.e. komencante de la tago, kiam mi malkaŝe eliris kun ĝi, estas al Vi pli malpli konata; cetero *tiun ĉi* periodon de la lingvo estas nun, pro multaj kaŭzoj, ankoraŭ neoportune tuŝadi; mi rakontos al Vi tial en komunaj trajtoj sole la historion de la *naskiĝo* de la lingvo.

Estos por mi malfacile rakonti al Vi ĉion, tion ĉi detale, ĉar multon mi mem jam forgesis; la ideo, al kies efektivigo mi dediĉis tutan mian vivon, aperis ĉe mi—estas ridinde ĝin diri—en la plej frua infaneco kaj de tiu ĉi tempo neniam min forlasadis. Tiu ĉi cirkonstanco parte klarigos al Vi, kial mi kun tiom da obstineco laboris super ĝi, kaj kial mi, malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj kaj maldolĉaĵoj, ne forlasadis tiun ĉi ideon, kiel ĝin faris multaj aliaj, laborintaj sur la sama kampo.

Mi naskiĝis en Bjelostoko, gubernio de Grodno, en la jaro 1859. Tiu ĉi loko de mia naskiĝo donis la



## BIRTH OF ESPERANTO.

TAKEN FROM A PRIVATE LETTER OF DOCTOR  
ZAMENHOF TO SINJORO BOROVKO.

*Printed, with the permission of both correspondents, in the  
year 1896.*

*Translated from the Russian by V.G.*

(This English translation is not literal; it aims to give only the general sense).

“ . . . You ask me how it was that the idea of creating an international language appeared to me, and what was the history of the Esperanto language from the moment of its birth till to-day? The whole public history of the language, that is to say, beginning from the day when I openly proclaimed it, is more or less known to you; further, it is not opportune now, for many reasons, to touch upon this period; I will therefore relate to you the common features alone of the history of the birth of the language.

“It would be difficult for me to tell you all this in detail, for much of it I have myself forgotten. The idea, to the realisation of which I have dedicated my whole life, appeared to me (it is ridiculous to say it) in my earliest childhood, and from that time never left me. This circumstance will partly explain to you why I have laboured upon the matter with so much obstinacy, and why, in spite of all difficulties and hardships, I have not abandoned this idea, as many others working in the same field have done.

“I was born in Bielstock, in the department of Grodno (Russia), in the year 1859. This place of my

direkton al ĉiuj miaj estontaj celadoj. En Bjelostoko la loĝantaro konsistas el kvar diversaj nacioj : Rusoj, Poloj, Germanoj kaj Hebreoj ; ĉiu el tiuj ĉi elementoj parolas apartan lingvon kaj neamike rilatas la aliajn. Tie pli ol ie la impresema naturo sentas la multepezan malfeliĉon de diverslingveco, kaj konvinkiĝas ĉe ĉiu paŝo, ke la diverseco de lingvoj estas la sola, aŭ almenaŭ la ĉefa kaŭzo, kiu disigas la homan familion, kaj dividas ĝin en malamikajn partojn.

Oni edukadis min kiel idealiston ; oni min instruis, ke ĉiuj homoj estas fratoj, kaj dume sur la strato kaj en la domo, ĉio ĉe ĉiu paŝo igis min senti, ke *homoj* ne ekzistas : ekzistas sole Rusoj, Poloj, Germanoj, Hebreoj, k.t.p. Tio ĉi ĉiam forte turmentis mian infanan animon, kvankam multaj eble ridetos pri tiu ĉi “doloro pro la mondo” ĉe la infano. Ĉar al mi tiam ŝajnis, ke la “grandaĝaj” posedis ian ĉiopovan forton, mi ripetadis al mi, ke kiam mi estos grandaĝa, mi nepre forigos tiun ĉi malbonon.

Iom post iom mi konvinkiĝis, kompreneble, ke ne ĉio fariĝas tiel facile, kiel ĝi prezentiĝas al la infano ; unu post la alia mi forĵetadis diversajn infanajn utopiojn, kaj nur la revon pri unu homa lingvo mi neniam povis forĵeti. Malklare mi iel min tiris al ĝi, kvankam, kompreneble, sen iaj difinitaj planoj. Mi ne memoras kiam, sed en ĉia okazo sufiĉe frue, ĉe mi formiĝis la konscio, ke la sola lingvo povas esti nur ia neŭtrala, apartenanta al neniu el la nun vivantaj nacioj.

Kiam el la Bjelostoka gimnazio mi transiris en la Varsovian duan klasikan gimnazion, mi dum kelka tempo estis forlogata de lingvoj antikvaj kaj revis pri tio, ke mi iam veturados en la tuta mondo kaj

birth gave the direction to all my future aims. The inhabitants of Bielstock are of four different nationalities—Russians, Poles, Germans, and Jews—each of which speaks a separate language, and is on bad terms with the others. There, more than anywhere, an impressionable nature feels the heavy misfortune of the diversity of tongues, and becomes convinced at every step that the diversity of language is the only, or at least the chief, cause which separates the human family, and divides it into inimical sections.

“I was brought up as an idealist. I was taught that all men are brothers; meanwhile in the street and at home everything, at every step, compelled me to feel that man does not exist, only Russians, Poles, Germans, Jews, etc. This thought ever deeply troubled (strongly tormented) my boyish mind—although many possibly will smile at this ‘sorrow for the world’ in a child. At that time it seemed to me that the ‘grown ups’ possessed a sort of almighty power, and I repeated to myself that when I was grown up I would without fail do away with this evil.

“Little by little I became convinced, of course, that this thing was not so practicable as it had seemed in my boyhood; one after the other I cast aside my various childish utopias, only the dream of one single tongue for all mankind I never could dispel. Dimly, although of course without any defined plans, I, in some way, was drawn to it. I do not remember when, but, at all events, sufficiently early, I became conscious that the single language must be in some way neutral, belonging to none of the now-existing nations.

“When I passed from the Bielstock High School to the Second Classical High School, Warsaw, I was for some time allured by the dead languages, and dreamed that some day I would travel through the

per flamaĵojn inklinados la homojn revivigi unu el tiuj ĉi lingvoj por komuna uzado. Poste, mi ne memoras jam kiamaniere, mi venis al firma konvinko, ke tio ĉi estas nebla, kaj mi komencis malklare revivigi pri *nova*, arta lingvo. Mi ofte komencadis iajn provojn, elpensadis artifikajn riĉegajn deklinaciojn kaj konjugaciojn, k.t.p. Sed homa lingvo kun ĝia, kiel ŝajnis al mi, senfina amaso da gramatikaj formoj, kun ĝiaj centoj da miloj de vortoj, kaj dikaj vortaroj, ŝajnis al mi tia artifa kaj kolosa maŝino, ke mi ne unufoje diras al mi: “for la revojn! tiu ĉi laboro ne estas laŭ homaj fortoj,”—kaj tamen mi ĉiam revenadis al mia revo.

Germanan kaj Francan lingvojn mi ellernadis en infaneco, kiam oni ne povas ankoraŭ kompari kaj fari konkludojn; sed kiam, estante en la 5-a klaso de gimnazio, mi komencis ellernadi lingvon Anglan, la simpleco de la Angla gramatiko ĵetiĝis en miajn okulojn, precipe dank’ al la kruta transiro al ĝi de la gramatikoj Latina kaj Greka. Mi rimarkis tiam, ke la riĉeco de gramatikaj formoj estas nur blinda historia okazo, sed ne estas necesa por la lingvo. Sub tia influo mi komencis serĉi en la lingvo kaj forĵetadi la senbezonaĵojn, kaj mi rimarkis, ke la gramatiko ĉiam pli kaj pli degelas en miaj manoj, kaj baldaŭ mi venis al la gramatiko plej malgranda, kiu okupis sen malutilo por la lingvo ne pli ol kelkajn paĝojn. Tiam mi komencis pli serioze fordoniĝi al mia revo. Sed la grandegulaj vortaroj ĉiam ankoraŭ ne lasadis min trankvila.

Unu fojon, kiam mi estis en la 6-a aŭ 7-a klaso de la gimnazio, mi okaze turnis la atenton al la surskribo “*Švejcarskaja*,” kiun mi jam multajn fojojn vidis, kaj poste al la elpendaĵo “*Konditorskaja*. Tiu ĉi “*skaja*” ekinteresis min kaj montris al mi, ke

world, and in flaming words persuade men to revive one of these languages for the common use. Subsequently, I do not now remember how, I came to the firm conviction that this was impossible, and I began, indistinctly, to dream of a new and artificial language. I often made attempts, inventing a profusion of artificial declensions and conjugations, etc. But the language of man, with, as it seemed to me, its endless mass of grammatical forms, its hundreds of thousands of words and ponderous dictionaries, appeared to me such an artificial and colossal machine that I more than once exclaimed—‘Away with dreams! this labour is beyond human powers!’—and nevertheless I always returned to my dream.

“In childhood (before I could make comparisons or work out conclusions) I had learnt French and German, but when, being in the 5th class of the gymnasium, I began to study English, the simplicity of the English grammar flashed upon my comprehension (became thrown in my eyes), thanks, chiefly, to the steep transition to it from the Greek and Latin grammars. I observed that the richness of grammatical forms was not a necessity, but merely the blind result of accidental history. Under that influence I commenced to search into the language and to discard the unnecessary forms, and I noticed that the grammar always melted more and under my hands, and soon I arrived at a tiny grammar, which, without causing any disadvantage to the language, occupied only a few pages. Then I began to devote myself to my dream more seriously. Still, the giant dictionaries left me no peace of mind.

“One day, when I was in the 6th or 7th class of the gymnasium, I, by chance, turned my attention to the sign ‘Švejskaja’ (drink shop), which I had already seen many times, and afterwards to the sign ‘Konditorskaja’ (sweet-shop). This ‘skaja’ aroused my

la ŝufiksoj donas la eblon el unu vorto fari aliajn vortojn, kiujn oni ne devas aparte ellernadi. Tiu ĉi penso ekposedis min tute, kaj mi subite eksentis la teron sub la piedoj. Sur la terurajn grandegulajn vortarojn falis radio de lumo, kaj ili komencis rapide malgrandiĝi antaŭ miaj okuloj.

“La problemo estas solvita!” diris mi tiam. Mi kaptis la ideon pri ŝufiksoj kaj komencis multe labori en tiu ĉi direkto. Mi komprenis, kian grandan signifon povas havi por la lingvo la plena uzado de tiu forto. . . . Baldaŭ post tio mi jam havis skribitan la tutan gramatikon kaj malgrandan vortaron. . . .

Tie ĉi mi diros ĝustatempe kelkajn vortojn pri la materialo por la vortaro. Multe pli frue, kiam mi serĉis kaj elĵetadis ĉion senbezonan el la gramatiko, mi deziris uzi la principojn de la ekonomio ankaŭ por la vortoj. Konvinkita, ke estas tute egale, kian formon havos tiu aŭ alia vorto, se ni nur *konsentos* ke ĝi esprimas la donitan ideon, mi simple *elpensadis* vortojn, penante, ke ili estu kiel eble pli mallongaj kaj ne havu senbezonan nombron da literoj.

Sed tiun ĉi penson mi tuj forĵetis, ĉar la provo kun mi mem montris al mi, ke tiaj elpensitaj vortoj estas tre malfacile ellerneblaj kaj ankoraŭ pli malfacile memoreblaj. Jam tiam mi konvinkiĝis, ke la materialo por la vortaro devas esti Romana-Germana, ŝanĝita nur tiom, kiom ĝin postulas la reguleco kaj aliaj gravaj kondiĉoj de la lingvo. Estante jam sur tiu ĉi tero, mi baldaŭ rimarkis, ke la nunaj lingvoj posedas grandegan provizon da pretaj jam vortoj internaciaj, kiuj estas konataj al ĉiuj popoloj kaj

interest, and showed me that suffixes would give me power to make out of one word other words which need not be separately learned. This thought began to take complete possession of me, and all at once I began to feel the ground beneath my feet. A ray of light had fallen upon the terrible giant dictionaries, and they began to shrink rapidly before my eyes.

“‘The problem is solved,’ I said then. I seized this idea of suffixes, and began to work hard in this direction. I understood how great a significance the full use of this power would have for the language. . . . Soon after that I had written the whole grammar and a small dictionary. . . .

“Here is an appropriate place for me to say a few words about the material for the dictionary. Much earlier, when I had examined and rejected every non-essential from the grammar, I had desired to exercise the principles of economy for the words also. Convinced that it was a matter of indifference what form any particular word took, so long as it was agreed that it should express a given idea, I simply invented words, taking care that they should be as short as possible and should not contain an unnecessary number of letters.

“But I immediately rejected this thought, for my own personal experiments proved that these invented words were very difficult to learn, and even more so to remember. I came to the conclusion that the material for the dictionary must be Romance-Teutonic, altered only so far as regularity and other important requirements of language demanded. Standing upon this ground, I soon observed that the present languages possessed an immense supply of words already international, which were known to

faras trezoron por estonta lingvo internacia—kaj mi kompreneble utiligis tiun ĉi trezoron.

En la jaro 1878 la lingvo estis jam pli-malpli preta. Tiel finiĝis la unua periodo de la lingvo.

Mi estis tiam ankoraŭ tro juna por eliri publike kun mia laboro, kaj mi decidis atendi ankoraŭ 5—6 jarojn kaj dum tiu ĉi tempo zorgeme elprovi la lingvon kaj plene prilabori ĝin praktike. Post duonjaro post la festo de 5-a de Decembro, 1878, ni finis la gimnazian kurson kaj disiris. Mi restis tute sola. Antaŭvidante nur mokojn kaj persekutojn, mi decidis kaŝi antaŭ ĉiuj mian laboron.

Dum kvin kaj duono da jaroj de mia estado en universitato, mi neniam parolis kun iu pri mia afero. Tiu ĉi tempo estis por mi tre malfacila. La kaŝeco turmentis min; devigita zorgeme kaŝadi miajn pensojn kaj planojn mi preskaŭ nenie estadis, en nenio partoprenadis, kaj la plej bela tempo de la vivo—la jaroj de studento—pasis por mi plej malgaje. . . .

Dum ses jaroj mi laboris perfektigante kaj provante la lingvon—kaj mi havas sufiĉe da laboro, kvankam en la jaro 1878 al mi ŝajnis, ke la lingvo jam estas tute preta. Mi multe tradukadis en mian lingvon, skribis en ĝi verkojn originalajn, kaj vastaj provoj montris al mi, ke tio, kio ŝajnis al mi tute preta teorie, estas ankoraŭ ne preta praktike.

. . . La praktiko do ĉiam pli kaj pli konvinkadis min, ke la lingvo bezonas ankoraŭ ian nekaptetblan “ion,” la kunligantan elementon, donantan al la lingvo vivon kaj difinitan, tute formitan “*spiriton*.”

Mi komencis tiam evitadi laŭvortajn tradukojn el tiu aŭ alia lingvo kaj penis rekte *pensi* en la lingvo neŭtrala.

Poste mi rimarkis, ke la lingvo en miaj manoj ĉesas jam esti senfundamenta ombro de tiu aŭ alia



all people, and which formed a veritable treasure for the future international language—and, of course, I utilised this treasure.

“In 1878 the language was more or less ready.

“Thus was finished the first period of the language.

“I was then still too young to appear publicly with my work, and I decided to wait five or six years longer, and during that time to test carefully the language and to work it out fully and practically. Half a year after the feast of December 5th, 1878, we finished our course at the gymnasium and separated. I remained alone. Foreseeing only mockery and persecution, I decided to hide my work from the eyes of all.

“For five and a-half years whilst I was at the University I never spoke to anyone about it. That was a very trying time for me. The secrecy tormented me. Compelled to conceal carefully my thoughts and plans, I went scarcely anywhere, took no part in anything, and the most enjoyable time of life—the student-years—was, for me, the saddest. . . .

“For six years I worked at perfecting and testing my language, and I had sufficient work, although in 1878 I had thought that it was quite ready. I made many translations and wrote original works in it, and severe trials showed me that what I had considered to be quite finished in theory was nevertheless not ready for practical use.

“. . . Practice ever more and more convinced me that a language requires still an indescribable something, a uniting element, giving to it life and a defined and wholly formed spirit.

“I began then to avoid literal translations from this or the other language, and endeavoured to *think* directly in the neutral language.

“Afterwards I noticed that the language in my hands had already ceased to be a shadowy reflection

lingvo, kun kiu mi havas la aferon en tiu aŭ alia minuto, kaj ricevas sian propran spiriton, sian propran vivon, la propran difinitan kaj klare esprimitan fizionomion, ne dependantan jam de iaj influojn.

La parolo fluis jam mem, flekseble, gracie kaj tute libere, kiel la viva patra lingvo. . . .

Mi finis la universitaton kaj komencis mian medicinan praktikon. Nun mi komencis jam pensi pri la publika eliro de mia laboro. Mi pretigis la manuskripton de mia unua broŝuro ("D-ro Esperanto. Lingvo internacia. Antaŭparolo kaj plena lernolibro") kaj komencis serĉi eldonanton. Dum du jaroj mi vane serĉis. Kiam mi jam trovis unu, li dum duonjaro pretigis mian broŝuron por eldono kaj fine—rifuzis.

Fine, post longaj klopodoj, mi prosperis mem eldoni mian unuan broŝuron en Julio de la Jaro 1887.

## PLENA GRAMATIKO DE ESPERANTO.

### A.—ALFABETO.

*Aa, Bb, Cc, Ĉĉ, Dd, Ee, Ff, Gg, Ĝĝ, Hh, Ĥĥ, Ii, Jj, Ĵĵ, Kk, Ll, Mm, Nn, Oo, Pp, Rr, Ss, Ŝŝ, Tt, Uu, Ŭŭ, Vv, Zz.*

Rimarko.—*Presejoj, kiuj ne posedas la literojn ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ, povas anstataŭ ili uzi, ch, gh, hh, jh, sh, u.*

### B.—REGULOJ.

(1) Artikolo nedifinita ne ekzistas; ekzistas nur artikolo difinita (la), egala por ĉiuj seksoj, kazoj kaj nombroj.

of the language with which I was occupied at this or the other minute, and was becoming imbued with its own spirit, its own life, a properly defined and clearly expressed physiognomy independent of any other influence.

“My speech flowed of itself flexibly, gracefully, and quite freely, just as my living native language. . . .

“I had left the University and begun my medical practice ; now I began to consider the public outcome of my labour. I had prepared the manuscript of my first brochure, ‘An International Language, by Dr. Esperanto,’ and begun to seek for a publisher. For two years I looked in vain. And when indeed I had found one, he spent half a year in preparing my brochure for publication, and finally—refused.

“At length, after strenuous efforts, I succeeded in publishing the brochure myself in July, 1887.”

### \*DAŬRIGO DE “PLENA GRAMATIKO.”

Rimarko.—*La uzado de la artikolo estas tia sama, kiel en la aliaj lingvoj. La personoj, por kiuj la uzado de la artikolo prezentas malfacilaĵon, povas en la unua tempo tute ĝin ne uzi.*

(2) *La substantivoj havas la finiĝon o. Por la formado de la multenombro oni aldonas la finiĝon j. Kazoj ekzistas nur du : nominativo kaj akuzativo ; la lasta estas ricevata el la nominativo per la aldono de la finiĝo n.*

\* This “Complete Grammar” is probably the “tiny” one spoken of by Dr. Zamenhof on page 55. Upon the “Plena Gramatiko” all national Esperanto Grammars have been built up—it is taken from the “*Fundamenta Krestomatio*,” the study of which the Doctor recommends as the indispensable model of style.

La ceteraj kazoj estas esprimataj per helpo de prepozicioj (la genitivo per *de*, la dativo per *al*, la ablativo per *per* aŭ aliaj prepozicioj laŭ la senco).

(3) La adjektivo finiĝas per *a*. Kazoj kaj nombroj kiel ĉe la substantivo. La komparativo estas farata per la vorto *pli*, la superlativo per *plej*; ĉe la komparativo oni uzas la prepozicion [konjunkcion] *ol*.

(4) La numeraloj fundamentaj (ne estas deklinaciataj) estas: *unu*, *du*, *tri*, *kvar*, *kvin*, *ses*, *sep*, *ok*, *naŭ*, *dek*, *cent*, *mil*. La dekoj kaj centoj estas formataj per simpla kunigo de la numeraloj. Por la signado de numeraloj ordaj oni aldonas la finiĝon de la adjektivo; por la multoblaj—la sufikson *obl*, por la nombroj—*on*, por la kolektaj—*op*, por la disdividaj—la vorton *po*. Krom tio povas esti uzataj numeraloj substantivej kaj adverbaj.

(5) Pronomoj personaj: *mi*, *vi*, *li*, *ŝi*, *ĝi* (pri objekto aŭ besto), *si*, *ni*, *vi*, *ili*, *oni*; la pronomoj posedaj estas formataj per la aldono de la finiĝo adjektiva. La deklinacio estas kiel ĉe la substantivoj.

(6) La verbo ne estas ŝanĝata laŭ personoj nek nombroj. Formoj de la verbo: la tempo estanta akceptas la finiĝon *-as*; la tempo estinta *-is*; la tempo estonta *-os*; la modo kondiĉa *-us*; la modo ordona *-u*; la modo sendifina *-i*. Participoj (kun senco adjektiva aŭ adverba): aktiva estanta *-ant*; aktiva estinta *-int*; aktiva estonta *-ont*; pasiva estanta *-at*; pasiva estinta *-it*; pasiva estonta *-ot*. Ĉiuj formoj de la pasivo estas formataj per helpo de responda formo de la verbo *esti* kaj participo pasiva de la bezonata verbo; la prepozicio ĉe la pasivo estas *de*.

(7) La adverboj finiĝas per *e*; gradoj de komparado kiel ĉe la adjektivoj.

(8) Ĉiuj prepozicioj postulas la nominativon.

(9) Ĉiu vorto estas legata, kiel ĝi estas skribita.

(10) La akcento estas ĉiam sur la antaŭlasta silabo.

(11) Vortoj kunmetitaj estas formataj per simpla kunigo de la vortoj (la ĉefa vorto staras en la fino); la gramatikaj finiĝoj estas rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vortoj.

(12) Ĉe alia nea vorto la vorto ne estas forlasata.

(13) Por montri direkton, la vortoj ricevas la finiĝon de la akuzativo.

(14) Ĉiu prepozicio havas difinitan kaj konstantan signifon: sed se ni devas uzi ian prepozicion kaj la rekta senco ne montras al ni, kian nome prepozicion ni devas preni, tiam ni uzas la prepozicion je, kiu memstaran signifon ne havas. Anstataŭ la prepozicio je oni povas ankaŭ uzi la akuzativon sen prepozicio.

(15) La tiel nomataj vortoj fremdaj, t.e. tiuj, kiujn la plimulto de la lingvoj prenis el unu fonto, estas uzataj en la lingvo Esperanto sen ŝanĝo, ricevante nur la ortografion de tiu ĉi lingvo; sed ĉe diversaj vortoj de unu radiko estas pli bone uzi sensanĝe nur la vorton fundamentan kaj la ceterajn formi el tiu ĉi lasta laŭ la reguloj de la lingvo Esperanto.

(16) La fina vokalo de la substantivo kaj de la artikolo povas esti forlasata kaj anstataŭigata de apostrofo.

Eltirita el "Fundamenta Krestomatio."

# CONTENTS.

---

	PAGE
Guide to Contents . . . . .	2
Alpa Rozo, <i>with analysis intended to help in memorizing the affixes</i> . . . . .	4
Kio okazis al Hencĵo, <i>with parallel translation (a rigmarole containing examples of the different uses of ig, iĝ, ec, aĵ, etc.)</i> . . . . .	18
La Letero al la Rekruto . . . . .	22
Bagh la Tigro . . . . .	29
Jingles . . . . .	32
The New Bilingualism . . . . .	33
Espero ( <i>with translation</i> ) . . . . .	34
Guadeamus . . . . .	36
La Celo Esperanta . . . . .	37
Nova Kanto . . . . .	38
God Save the King . . . . .	40
Tiny Tim's Christmas Dinner . . . . .	41
Kristnasko en Svedujo . . . . .	45
Mi Mem . . . . .	48
Naskiĝo de Esperanto . . . . .	50
Plena Gramatiko . . . . .	60









3 1158 01116 4968

UC SOUTHERN REGIONAL LIBRARY FACILITY



A 000 126 439 9

# The Standard Series

# ESPERANTO

---

---

## Esperanto Primer

Containing Grammar, Vocabulary and Exercises, with Key, by J. C. O'CONNOR, PH.D. Paper, 10c. net.

## Handy Pocket Vocabulary

English-Esperanto and Esperanto-English, by J. C. O'CONNOR, B.A. Paper, 10c. net.

## A First Reader in Esperanto

By E. A. LAWRENCE. Cloth, 25c. net.

## Lessons in Esperanto

Based on DR. ZAMENHOF'S "EKZERKARO,"  
By GEORGE W. BULLEN. Cloth, 25c. net.

## Esperanto

Student's Complete Text Book  
boards, 50c. net.

STAC

University

Southern

Library

---

---

**FLEMING H. REVELL COMPANY**

*Publishers*